


中國報

EL POPOLA

ĈINIO













## INTERNI

Kun granda intereso mi legis la artikolon de Zhang Qingzhen: "Terapio de aŭriklakupunktura pinĉado servas al malsanuloj". Bonege estus, se oni ankaŭ klarigus la fakvortojn uzitajn. Mi legis ankaŭ "Pri kio pensas la nunaj studentoj de Ĉinio?". Mi jam spertis: dum laboristoj devas perlabori ofte sub kondiĉoj malfacilaj por la vivteno de la familio, studentoj inklinas reveni pri facila vivo aŭ granda mono kaj tiel perdas la realecon por la vivo. Fakte, oni ne nur povas postuli, sed ankaŭ devas esti preta ion fari por la bono de la socio.

**W. KOBELT** (Svisio)

Mi estas turisma ĉiĉerono. Al mi tre plaĉas ĉiuj artikoloj temantaj pri antikvaĵoj, muzeoj ktp. Do mi volus vidi en la revuo pli multajn artikolojn similajn al "LA IMPERIESTRAS PALACO" aŭ "LAŬ LA SUDA SILKA VOJO".

**Z. SIEKIERSKI** (Pollando)

Prefere mia intereso celas al la artikoloj, kiuj pritraktas la vivon de la ĉina popolo post la malfermo de la pordo al ĉiuj flankoj.

**W. BERGMANN**  
(FR Germanio)

Oni devas uzi la revuon ducele: A. Montri Ĉinion kiel ĝi estas; do ne estas vere interese scii opinion de alilandano, ĉar li ne reprezentas, kompreneble, la ĉinnacian senton; B. Uzi Esperanton por skribi pri Ĉinio.

**P. PETIOT** (Brazilo)

Al mi ŝajnas, ke vi ofte troigas reklaman rolon de la revuo. Ĝi ja devas unue propagandi Esperanton diversmaniere, ankaŭ per konatigo de la lando. Sed fojfoje mi vidas simplan turistan prospekton kun vidindaĵoj. Ankoraŭ mankas seriozaj artikoloj pri ĝenerala ideo de Esperanto.

**M. A. SERGEEVIĈ** (USSR)



# ENHAVO

- 7 Malviglado kaj florado de Shenyang
- 30 Vojaĝo en suda Henan (II)
- 24 Huancheng-urbeto
- 32 ĈINA LITERATURO:  
El la romano "Jin Ping Mei"
- 18 LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (7):  
Xichang, vidindejo en suda Sichuan
- 56 Ĉinaj piramidoj
- 59 LA IMPERIESTRĀ PALACO:  
Qianqing-pordo kaj kortega kunveno
- 14 INTERVJUOJ:  
Urbestro Wu Disheng
- 52 POR VIA SANO:  
Korposanigaj metodoj (X)
- 53 Branda kulturo de Guizhou
- 16 Animbela persono, animbela lingvo
- 48 LIBERA FORUMO DE EMINENTAJ  
ESPERANTISTOJ:  
**Kiel naskiĝis la lingvoj**
- 51 ESP-NOVAĴOJ
- 41 POR KOMENCANTOJ:  
Tragedio el dorlotado
- 27 Bredado de maraĵ estaĵoj en Qingdao

- 45 Idoj de raraj bestoj kaj birdoj
- 11 **Prosperiĝo de deficitata ferŝtala fabriko**
- 37 La infana mondo en Tianjin ĉe Bohai-mararo
- 44 ALILANDANOJ PRI ĈINIO:  
Ĉinio, tiele mi ekkonis vin!
- 4 INTER NI
- 29 KORESPONDI DEZIRAS
- 40 KURANTAJ AFEROJ
- 42 Juna pentristo Mi Xiong
- 55 ĜENROJ DE NACIMALPLIMULTOJ:  
Lisu-oj
- 23 Labuleng-templo

## SUR LA KOVRILO:

Mjaŭ-aj knabinoj kun kapornamo

Foto de **TANG KELI**

## INTERNE DE LA KOVRILO:

Shenyang

Foto de **CAI HAIFENG**

Shenyang estas la kvara granda urbo de Ĉinio kaj la ĉefurbo de Liaoning-provinco. Ĝi situas en suda parto de nordorienta Ĉinio.

- 4 Akvofalo en Changbai-montaro

## SUR LA DORSKOVRILO:


[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]


Glacirivero de Argentino

La Sala Urso-Lago de Rumanio

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

- 1. Shenyang
- 2. Baotou
- 3. Pingdingshan
- 4. Nanyang
- 5. Qingdao
- 6. Weishan-lago








# Malviglado kaj Florado de Shenyang

de WEI LIAO




Sur la placo antaŭ la Stacidomo de Shenyang  
Foto de HAI FENG

En produktejo de aviadiloj  
Foto de SUN YIFU



En la Shenyang-a Tria Ilmaŝina Fabriko  
Foto de WANG JIA



En fabriko de lipharraziloj funkciigata de Ĉinio kaj Usono Foto de HAI FENG

**L**A brava “nordorienta tigo”, originala besto de la nordorienta parto de Ĉinio, estas unu el la raraj bestoj de la mondo. Oni ne scias, kiam la Shenyang-anoj de la nordoriento ekhavis la kromnomon “Nordorienta Tigo”. Oni diris, ke tio devenis de la fakto, ke ili estas entuziasmaj kaj malkaŝemaj kun temperamento de tigo. Antaŭ kelkaj monatoj, kiam mi venis al Shenyang kaj havis kontaktiĝon kun multaj Shenyang-anoj, mi trovis, ke ili estas vere viglaj, sed ne senzorgaj, ankaŭ ili spertis diversajn malfacilojn en la homa mondo.

## MALHONORITA “NORDORIENTA TIGRO”

La kromnomo “Nordorienta Tigo” por la Shenyang-anoj en la 50-aj jaroj estis honora, ne nur pro la kuraĝa kaj spitema temperamento de Shenyang-anoj, sed ankaŭ pro la prospera ekonomio de Shenyang.

Tiam, kiam 6 el la 156 gravaj ŝtataj konstruoj komenciĝis en



Nova flughaveno en Shenyang

Foto de SUN YIFU

Shenyang, kiam la unuaj traktoroj kun marko “Dongfeng” fabrikitaj de Shenyang-anoj eniris en vilaĝojn, kiam grupo post grupo de tieaj kadroj kaj teknikistoj iris al aliaj provincoj por helpi ilian konstruadon, kiel gloraj kaj honoraj estis la Shenyang-anoj!

Tamen, en la fino de la 70-aj jaroj kaj en la komenco de la 80-aj jaroj, la honora nomo “Nordorienta Tigo” ekpurtis sencon de mokiteco.

Oni rakontis al mi la staton de Shenyang antaŭ kelkaj jaroj:

En magazeno klientoj diris antaŭ vendotablo de ŝuoj: “Vidu, kiel malgraciaj aspektas la ŝuoj! Ili similas al grandkapaj fiŝoj!” “Hm! Ili estas produktitaj certe en nia urbo.” Antaŭ vendotablo de vestoj oni ankaŭ plendis: “Diru, kiel aspektas la vesto?” “Ĝi similas al taoista robo!” “Ha, la urbego Shenyang estas tiel malaltnivela en produkto!”

Ĉe la elirejo de fervojaj stacioj, la elvagoniĝintoj kaj atendantoj formis homan maron. Reciprokinde salutojn, iu demandis: “Ĉu vi aĉetis por mi veston?” “Sendube, vi certe estos kontenta!” Najbare de ili, alia elvagoniĝinto kun pakajoj grandaj kaj malgrandaj en la manoj diris al siaj konatoj: “Rigardu, kiel multe da ŝuoj mi aĉetis por vi!” “Ĉu tio estas menciinda? Antaŭ nelonge, kiam

mi estis en Ŝanhajo, mi sendis al Shenyang jam dek pakajojn!”

Tiam Shenyang-anoj sentis netolereblajn maloportunon kaj ofendiĝon. La registaro porciumis plurnutraĵojn ĉiumonate: 150 gramoj da kuiroleo, 100 gramoj da viando, unu kg da tritika faruno. Por aĉeti sukron, sapon, kukojn, bongustigan pulvoron k. a., entute 44 varojn, oni devis uzi biletojn. Krome, la urbo estis katenita de iu absurda ordono: Alilokaj produktaĵoj estis malpermesitaj transporti en Shenyang kaj la produktaj materialoj de Shenyang estis malpermesitaj transporti al aliaj lokoj. Laŭdire, tio celis protekti disvolviĝon de la lokaj industrioj. Tiam la nomo “Nordorienta Tigo” por Shenyang-anoj fariĝis moko.

## ALTERNATIVO

Fakte, Shenyang estas esperplena loko. Ĝi situas en la fekunda ebenaĵo de la aluvioj de la riveroj Liaohe kaj Hunhe kaj posedas subtere abundan rezervon de karbo, petrolo, natura gaso, feraj metaloj kaj nemetalaj minoj. Fervojoj, ŝoseoj kaj potenca elektroreto kunligas Shenyang kun la ŝtala urbo Anshan, karba urbo Fushun, karba kaj fera urbo Benxi (Benŝji), karba kaj elektra urbo Fuxin (Fuŝin), kemifibra urbo Liaoyang (Ljaŭjang) kaj karba kaj greno



bazo Tieling kaj formis industri-an urbaran regionon kun honora nomo "Orienta Rurvalo".

Estis malfeliĉe, ke en longa periodo en la pasinteco pro kateno de la ekonomia sistemoj la kuraĝaj "Nordorientaj Tigroj" eĉ ne povis moviĝi. En mia vizitado mi informiĝis pri iu absurda okazo: La Shenyang-a Afinacia Fabriko estas granda fabriko speciala por produkti kupron, la Shenyang-a Kabla Fabriko estas granda produktejo de elektraj kupraj drato kaj kablo. Ili situas unu apud alia kaj estas kunligitaj per speciala fervojo. Sed, la kupro produktita de la afinacia fabriko estis transportita aliloken dum la kupro bezonata de la kabla fabriko estis alportita el Yunnan-provinco fore je miloj da km. La kaŭzo kuŝis en tio, ke la du fabrikoj apartenas ne al sama sistemo.

Krome, malnoviĝo de teknikoj, ekipaĵoj, elmodiĝo de produktaĵoj, malfortiĝo de ekonomia efiko, konkurenca kapablo k. a. ekzistis preskaŭ en la 210 gandraj kaj mezgrandaj entreprenoj kaj 1 600 kolektivaj entreprenoj de Shenyang. Alilokanoj mokis la produktaĵojn de Shenyang, ke ili estas malbelaj, grandaj kaj krudaj.

Aŭ toleri la maloportunon kaj ofendiĝon, aŭ reformi la ekonomian sistemon, leviĝi el la maloportuno kaj ofendiĝo kaj prosperigi la ekonomion.

Antaŭ la Shenyang-anoj troviĝis neniu alia rimedo ol reformado!

En oktobro 1984, puŝate de la ekonomia reformo ĵus aperinta en Ĉinio, Shenyang-anoj finfine kaptis la ŝancon decidigan por la sorto kaj estonteco kaj faris grandskalan reformon. Tio kreis en la urbo multajn la unuajn de Ĉinio:

La unua aŭkciita butikoj;

La unua biloborso;

La unua luita entrepreno;

La unua bankrotinta entrepreno;

...

La reformado aperigis verdaĵon sur la teritorio de 8 515 kvadrataj

kilometroj.

La totala industria produktovoloro de Shenyang en 1988 atingis 23.7 miliardojn da juanoj, sed tiu antaŭ 10 jaroj estis 8.92 miliardoj da juanoj. Ĝia totala po-detala vendosumo en 1988 atingis 9.27 miliardojn da juanoj, sed tiu antaŭ 10 jaroj estis 1.64 miliardoj da juanoj. La jara meznombra salajro de oficistoj kaj laboristoj en 1988 estis 1 860 juanoj, sed tiu antaŭ 10 jaroj nur 660 juanoj.

La tajdo de la reformado detruis la antaŭan merkatan strukturon. Pasis nur unu jaro, famaj produktaĵoj de aliaj lokoj ektorentis al Shenyang. Antaŭ vendotablo de ŝuoj de la Shenyang-a Komerca Domego, mi vidis mezaĝulinon kun kuntiritaj brovoj elektanta ŝuojn. "Ĉu la ŝuoj estas produktitaj en Ŝanhajo? Ĉu ili plaĉas al vi?" mi alparolis ŝin. Eklevinte la brovojn, ŝi ĵetis al mi rigardon kaj diris: "Kial la ledaj ŝuoj faritaj en Ŝanhajo estas ekskluzive mallarĝaj. La piedoj de mia edzo estas dikaj. Tiaj ŝuoj estas ne taŭgaj."

Ankaŭ Shenyang-anoj komencis ĉikani ledajn ŝuojn de Ŝanhajo.

## FLUGI FOREN

Dum mi restis tie, mi vizitis ankaŭ la Shenyang-an Kompanion de Aviadiloj, la Shenyang-an Trian Ilmaŝinan Fabrikon, la Shenyang-an Kablan Fabrikon k. a. Mi vidis, ke la tieaj fabriksdomoj estas altaj kaj vastaj. Oni diris al mi, ke tiuj fabrikoj havas tian skalon jam de la 50-aj jaroj.

Influante de grandaj industrioj, la tieaj loĝantoj estas malproksimvidaj. Por prosperigi la ekonomion, ili fiksis siajn rigardojn sur la mondaĵ merkatoj.

La Shenyang-a Tria Ilmaŝina Fabriko fondiĝis en 1937. Nun ĝi estas granda elita entrepreno en produktado de aŭtomataj ilmaŝinoj kaj ekspluata centro de ilmaŝinoj. Ĝi produktas ĉefe ses sistemojn da ilmaŝinoj: ciferregaj ilmaŝinoj, pluraksaj aŭtomataj kaj duonaŭtomataj ilmaŝinoj, kombi-

naj ilmaŝinoj, ordinaraj ilmaŝinoj kaj aŭtomataj produktaĵoj linioj.

Ĝiaj ilmaŝinoj estas eksportataj ekde 1964, sed tiam ili estis relative postigintaj kaj ĉiujare oni eksportis nur 10-30 ilmaŝinojn. Ĝia produktado iris laŭ gvida plano de la ŝtato, tial al ĝi mankis kriza kaj urĝa sento. En la 80-aj jaroj, kun profundiĝo de la reformado kaj pordo-malfermo, ĉiam pli intensiĝis la merkata konkurenco. La fabriko komencis transformiĝi de produkta entrepreno al la produkt-komerca kaj akiris rimarkindan ekonomian efikon en la batalo por sin vivtenadi kaj okupis merkatojn en la lando dank' al siaj bonkvalitaj produktaĵoj.

Por sia plua disvolviĝo en la estonteco, la fabriko plirapidigis sian konstruadon por eksportado kaj faris mezperiodan kaj longtempan planojn por ekspluati internaciajn merkatojn. En 1985 ĝi transportis siajn pluraksajn ilmaŝinojn kiel ĉefajn produktaĵojn al Usono por eksponado kaj vendo, starigis industri-komercan servon en Los-Anĝeleso kaj per tio pliiĝis renomo de ĝiaj produktaĵoj. La servo ĝustatempe sendas al la fabriko informojn pri bezono de eksterlandaj merkatoj. En 1988 la fabriko projektis universalan ilmaŝinon SK-360 laŭ bezonoj de klientoj kaj ŝanĝiĝo de merkato, vendis pli ol 400 tiajn maŝinojn unufoje en Usono kaj gajnis 1.5 milionojn da usonaj dolaroj. Nun la fabriko ĉiujare produktas ĉ. 2 000 ilmaŝinojn de proksimume 100 specoj, el kiuj 30 tipoj de 20 specoj eksportiĝas al 62 landoj kaj regionoj.

En la konstruata Eksportaĵ-prilabora Distrikto de Shenyang mi havis profundan impreson pri la firmdecida volo de la urbo en praktiko de la pordo-malferma politikado.

La distrikto estas antaŭiranta loko kaj ĉefa fenestro de Liaodongduoninsulo en praktikado de la pordo-malferma politiko kaj ankaŭ grava konsistiga parto de la ĝenerale reformata Tiexi(Tješji)-a Industria Distrikto en la Sepa Kvinjara Plano (1986-1990) de la



Nova turisma loko en Shenyang

Foto de SUN YIFU

ŝtato. La unuaperioda konstruo plenumiĝos en ĉ. 5 jaroj kaj tiam aperos en la administrado iagrade sendependa moderna industria bazo, destinita ĉefe por enkonduki alilandajn kapitalojn kaj avangardajn teknikojn kaj produkti eksportaĵojn. Laŭ la projekto oni tie konstruos modernan industri-an distrikton kun areo de 34.48 kvadrataj kilometroj kun sintezaj funkcioj de komerco, financo, kulturo, eduko, vivo kaj amuzo, celantan partopreni en labordivido de internacia ekonomio kaj ĉefe produktantan altteknikajn produktaĵojn.

Kun ĝojo mi forlasis la distrikton. La gastama mastro aŭte veturigis min sur la Shenyang-Dalianan Ekspresan Vojon. Kiam la aŭto kuris je pli ol 100 km hore, mi sentis min agrable kvazaŭ de flugo. Tiu sento ĉiam akompanis min dum mia tuta vojaĝo antaŭ mia forlaso de Shenyang. ■

En fabriko de pasaĝeraŭtoj


Foto de SUN YIFU





# Prosperiĝo de Deficita Ferŝtala Fabriko

Teksto kaj fotoj de DA WEI



Produktado de alojo el rarateraj metaloj



Parto de la fabriko



Zhou Zili (dekstre)

**I**U ferŝtala fabriko, senprofita en sia 22-jara entreprenado kaj preskaŭ bankrotinta pro deficino de pli ol 12.7 milionoj da juanoj, poste havis novan fabrikestron, fariĝis senŝulda kaj post ok-jara peniga luktado de la fabrikestro, oficistoj kaj laboristoj gajnis profiton, per kiu oni povas konstrui plian ferŝtalan fabrikan. Tio okazis en la Dongfeng-a Ferŝtala Fabriko de Baotou de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio.

## “MALGRANDA BAOTOU-ŜTALEJO” KAJ “AŬDACULO ZHOU”

En la lasta tagdeko de aŭgusto mi forlasis Pekinon, kie oni portis ankoraŭ ĉemizon kaj jupon, kaj venis al la urbo Baotou atakata de malvarmo. En la vagonaro mi informiĝis, ke la Dongfeng-a Ferŝtala Fabriko havas kromnomon malgranda Baotou-ŝtalejo kaj ĝia estro kromnomon “Aŭdaculo Zhou”.

Baotou, kun larĝaj stratoj, estas tipa norda urbo kaj montras kruŝan, malkaŝeman kaj donaceman stilon de norda Ĉinio. Baotou estas ankaŭ fama ŝtala urbo pro sia Baotou-a Ferŝtala Kompanio. La Dongfeng-a Ferŝtala Fabriko sidas en ĉirkaŭurbo, okupas areon de 1.8 kv. km. kaj havas pli ol 3 500 oficistojn kaj laboristojn. De sia fon-

diĝo ĝis la fino de la sepdekaj jaroj, tiu fabriko fariĝis fama defici-ta entrepreno en la urbo pro diversaj kaŭzoj kaj malbona administrado. Enirinte la okdekajn jarojn la fabriko preskaŭ bankrotis. Tiam, ĝiaj ekipaĵoj estis malnovaj, la teknologioj postigintaj kaj la porlabora medio tre malbona. Unu el ĝiaj du altfornoj fariĝis neutiligebla kaj la alia bezonis riparon, plene deprimiĝis la oficistoj kaj laboristoj. Oni eĉ aŝertis, ke tiu fabriko estas senespera. Estis imagebla la malfacileco por ŝanĝi ĝian staton.

Ĝuste tiam Zhou Zili, kiu diplomiĝis el la Pekina Metalurgia Kolegio kaj laboris kiel teknikisto de la fabriko pli ol 20 jarojn, fariĝis ĝia estro. Kun tia malprospera fabriko, kion li devis fari? Laŭ sia plurjara esploro, li decidis ekspluati alojn el rarateraj metaloj kaj reformi la altfornojn. En 1984, li riske prunteprenis 33.8 milionojn da juanoj, konstruigis en la fabriko enlande avangardan altfornon kun volumeno de 100 kubmetroj kaj faris reformon al ĉiuj ĝiaj ekipaĵoj, kio rapide prosperigis la fabrikan. Post tri jaroj, ĝiaj produktaj teknikoj jam atingis avangardan nivelon en la samtipaj entreprenoj de Ĉinio. La fabriko fariĝis loka metalurgia entrepreno ĉefe por produkti raraterajn metalojn kaj ankaŭ feron kaj ŝtalon. Ĝia produkta

povo de aloj el rarateraj metaloj okupis la duan lokon en Ĉinio kaj ĝiaj produktaĵoj havis grandan debiton enlande kaj vendiĝis en Japanio. En 1987 la fabriko ne nur sin liberigis de la ŝuldo, sed ankaŭ donis al la ŝtato profiton kun rapideco de jara kresko je 5%. Samtempe kreskis ankaŭ la enspezo de la oficistoj kaj laboristoj.

## REFORMO PER PRUNTEPRENO

Zhou Zili aĝas pli ol 50 jarojn kaj estas maldika kun sulkoplena vizaĝo. Pro longtempa laco li malsaniĝis je la koro kaj stomako kaj lastatempe li devis ĉiutage preni medikamenton antaŭ iro al laboro. Tamen en la fabriko li estis energiplena.

En nia interparolo mi trovis, ke li estas elokventa. Oni diris, ke li neniam uzas manuskripton dum parolado. Ankaŭ lia memoro estas mirinda. Li povas tuj eldiri ĉiun ajn produktan ciferon de la fabriko. Li fumis multe, tial ni estis sieĝata de fumo dum nia interparolo.

“Kiel vi ekhavis la penson reformi per pruntepreno? Ĉu vi ne timis tiel grandan riskon, ke ĉiu membro de via fabriko devas ŝuldi meznombre 10 000 juanojn?” mi demandis.

Fabrikestro Zhou diris: “Oni nomis min aŭdaculo Zhou. Tion mi ne tute aprobis. Sola sentimeco entenas blindecon. Mia kuraĝo baziĝis sur serioza konsidero, tial mi estis memfida. Antaŭ kelkaj jaroj, mi respondecis pri eksperimentado por ekstrakti niobon el fera fluidaĵo de mez- kaj malgrasa erco en la loko Baiyun’ebo. Tiam al nia fabriko mankis teknika forto, mi veniĝis fakulojn el aliaj lokoj kaj havigis al ili esplorajn lokojn kaj aliajn laborkondiĉojn. Post pli ol du jaroj la eksperimentado sukcesis kaj gajnis ŝtatan triagradan premion por scienc-teknika invento. La invento apartenis al nia fabriko. Laŭ ĉina proverbo tio estas veturigi ŝipon per alies akvo. El tio ricevis



sugeston la posta reformo per pruntepreno.”

Fabrikestro Zhou daŭrigis, ke ekde 1984, pro la ŝtata reguligo de ekonomia politiko, la fabriko ne plu ricevis ŝtatan investon. La disvolviĝo de entrepreno devas baziĝi sur ĝia propra forto. Por sin liberigi de la malfacila stato, nia fabriko nepre devis fari teknikan reformon. De kie ni prunteprenos grandan monsumon? Tiutempe, en la ekonomio de Ĉinio aperis jena situacio: La disvolviĝo en suda Ĉinio estis rapida, tie estis grandaj kapitaloj, sed mankis naturaj riĉaĵoj. La disvolviĝo en norda Ĉinio estis malpli rapida, tie mankis kapitalo, sed abundis naturaj riĉaĵoj. Vidinte tion, Zhou Zili prunteprenis grandan monsumon de suda Ĉinio en formo de kompensa negoco.

La pruntepreno skuis la fabrikon, kaj venis al li diversaj prefortoj. Iuj timis, aliaj maltrankviliĝis, triaj zorgeme diris: “Tiom grandan monsumon Zhou prunteprenis. Se okazos malsukceso en la produktado, kiel nia fabriko povos sin liberigi de la ŝuldo?” La oficistoj kaj laboristoj evidente estis katenitaj de tradicia koncepto. En la sepdekaj jaroj, Ĉinio fieris, ke ĝi havas nek enlandan nek eksterlandan ŝuldon. Zhou Zili opiniis, ke li devas unue rompi la psikan baron kaj rutinon. Li malkaŝe klarigis siajn intencon kaj projekton, ke en certa tempo, la ekonomia utilo de la reformitaj ekipaĵoj certe superos la ŝulditan monsumon. Liaj klarigoj estis iom post iom konitaj de aliaj gvidantoj kaj la vasta personaro de la fabriko kaj ricevis ilian subtenon.

## KOMUNA KLOPODO

Zhou Zili prunteprenis monsumon, sed la produktado bezonis klopodon de la tuta personaro de la fabriko.

En la pasintaj pli ol 30 jaroj la Dongfeng-a Ferŝtala Fabriko havis sian historion de malprospero kaj prospero, eĉ en la plej malfacila



Transportota alojo el rarateraj metaloj

periodo la oficistoj kaj laboristoj ne forlasis sian fabrikon. Ili diris: “La espero de la fabriko estas ankaŭ la nia.” En la pasintaj dek jaroj, kiam la fabriko luktis por sia ekzisto, sin dediĉi al la fabriko, ĝin ami kaj prosperigi fariĝis komuna volo de la tuta personaro.

Dum la vizito mi aŭdis multajn rakontojn pri la oficistoj kaj laboristoj de la fabriko.

En la aloja laborejo, el la dua elektra forno ŝprucis fajreroj, iu sagaca laboristo komandis ĉe la forno siajn kunlaborantojn en streĉa kaj bonorda laboro... elfluis plia forno da fluidaĵo de magnezia alojo. La skipa produkto kun postulata kvalito kreis novan rekordon de 12.5 tunoj. Li estis Wu Zhonglin, estro de A-skipo. Jam naŭ jarojn li laboris ĉe la forno. Li amis sian laboron kaj estis studema, tial li rapide posedis la teknikojn por afinacii silician kaj magnezian alojon. La produktokvanto de lia skipo ĉiam estis en la unua vico en la laborejo. En festotagoj kaj ferioj, li ĉiam persistis en laborado, por ke aliaj povu vivi kune kun siaj familianoj. Oni diris, ke li estas varma kiel fajro.

32-jara Zhao Xijun (Ĝaŭ Ŝigjun) estis teknikistino de la mulda laborejo. Ne fortimigis ŝin la bruado, pulvoro, fumo kaj varmo. Ŝi kaj ŝiaj kamaradoj projektis

kaj muntis ferfandan fornon kun produktokvanto de 3 tunoj, kiu produktis bonkvalitan pregitan magnezian platon post plurfoja teknologia reformo. Tio ĉiujare ŝparis por la fabriko pli ol 90 000 juanojn. Por levi la teknikan nivelon de la muldistoj, ŝi vespere donis al ili teknikan lecionon. En 1987 31 laboristoj de ŝia laborejo partoprenis mezklasan teknikan ekzamenon de la Metalurgia Buroo de Baotou kaj ĉiuj akiris diplomon.

La fornistoj en la silici-fera laborejo faras manlaboron penigan kaj malpuran, sed ĉiumonate enspezis nur ĉ. 200 juanojn. Antaŭ kelkaj jaroj, multaj urbetaj entreprenoj volis dungi laboristojn de tiu ĉi laborejo je monata salajro de 500 juanoj, sed tiuj junuloj ne forlasis sian fabrikon.

La oficistoj kaj laboristoj amis sian fabrikon pro tio, ke ankaŭ ĝiaj gvidantoj amis siajn laborantojn. En la pasintaj dek jaroj, la gvidantoj de la fabriko ĉiam konigis la gravajn aferojn kaj decidojn al la laborantoj kaj ĉiam zorgis pri ĉiuj siaj membroj en sekureco, medio-protektado, bonstatigo, salajro, loĝejo, vizito de iliaj infanoj al infangardeno kaj lernejo k.a., kio multe varmigis la koron de la laborantoj kaj stimulis ilin al aktiva laborado. ■

# Urbestro Wu Disheng

de WEI LIAO

**E**N somera antaŭtagmezo laŭ invito mi iris en la kabineton de Wu Disheng, urbestro de Shenyang. Li stariĝis kun la dorso al fenestro kaj akceptis min. La sunlumo malantaŭ li konturis lian altan figuron, kiu impresis min kiel monto.

Sidiginte, mi fiksas la rigardon sur li kaj vidis, ke lia vizaĝo estas modesta kaj afabla.

“Mi estas malkaŝema al la raportistoj. Mi malfermas al vi la pordon, fenestrojn kaj murojn,” foje tion diris la urbestro al vizitantaj raportistoj. Ĉi-foje ankaŭ mia intervjuo konfirmis tion.

Por aŭskulti lian parolon, oni devas turni sian tutan atenton. Mi timis, ke mi ne kaptos lian spritan kaj rezoneman pensadon.

## MALGLATA VIVOVOJO

En la infaneco Wu Disheng estis klerigata en katolika lernejo. Li forlasis la lernejon kun jena noto: romantika temperamento kaj logika pensado.

En 1952, la 16-jara Wu Disheng venis sola en Shenyang kaj komencis sian studentan vivon en la Nordorienta Politekniko. De tiam li restis en tiu urbo.

Li finis sian studentan vivon en 1956 kaj eklaboris en fabriko de la urbo. En 1957 en Ĉinio okazis politika batalo kontraŭ dekstruloj, kiu esence estis afero kun grava eraro. En la batalo oni estis dividita en grupojn dekstran kaj maldekstran. Multaj honestaj intelektuloj estis misakuzitaj kiel dekstruloj kaj severe kritikitaj. Pro sia malkontento pri la realo en la politekniko, ankaŭ Wu Disheng estis maljuste akuzita.

Tiel Wu komencis sian 20-jaran suferplenan vivon. Pro tio lia edzino forlasis lin kaj fiksloĝiĝis en Hongkong kune kun sia filino. Deprimigante, Wu Disheng decidis vivi sola kaj impliki nenium alian en sian malfeliĉon. En 1965 iu bonkora laboristo volonte svatis al li sian filinon kaj plurfoje persvadis lin pri la edziĝo. La honesteco kaj bonkoreco de la maljuna laboristo emociis Wu Disheng. Fine li edziĝis al lia filino, instruistino de elementa lernejo. Sed tute ekster lia atendo, en la sekvanta jaro eksplodis la tiel nomata kultura revolucio, kiu daŭris 10 jarojn. En tiu longa tempo, kiel “ne bone transformita dekstrulo” Wu Disheng suferis grandan turmenton. Post severa kritikado li estis sendita al kamparo. Tio malfeliĉigis ankaŭ lian edzinon. Ŝin atakis pluraj malsanoj kaj ŝi povis nur forlasi la laboron kaj ripozi en la gepatra hejmo.

La maljusta verdikto pri Wu Disheng estis renversita nur post la finiĝo de la dekjara ĥaoso. De tiam lia stato mirinde ŝanĝiĝis. En 1979 li fariĝis teknikisto de la fabriko. En la sekvanta jaro li funkciis kiel vicsekciestro. En 1981 li estis promociita kiel vicĉefingeniero. En 1982 li estis nomumita ĉefingeniero kaj vicfabrikestro. En 1983 li fariĝis fabrikestro kaj kumulis ĉefingenierecon. En 1984 li laboris kiel estro de la metalurgia buroo sub la magistrato, post 3 monatoj li estis elektita kiel vicurbestro kaj pli poste li fariĝis aganta urbestro kaj fine urbestro.

Lia rapida promociiĝo vekis suspekton ĉe multaj homoj. Foje, iu studento demandis lin: “Konigu al mi vian rang-altigan rimedon!”

“Ho, la ĉielo scias! En la politikistaj rondoj de nia urbo mi havas nenium konaton. Mia unusola parenco en la urbo estas maljuna laboristo,” kun rideto respondis Wu.

## VOLONTA SERVANTO

En la 2 jaroj post sia urbestriĝo en 1984, Wu Disheng faris nenium publikan paroladon. Oni diris postdorse: “Ho ve! Li eĉ ne scias bone paroli. Ĉu li povus bone labori kiel urbestro?”

“Min ĉagrenas tio, ke mi devas prizorgi ĉion kiel urbestro,” plendis li. “Kion fari, se mi mem ne estas certa pri tio?”

Wu opiniis, ke por gvidanto plej grave ne estas montri sian propran talenton, sed elmontrigi talenton de plimultaj popolanoj. Li ofte kuraĝigis siajn subulojn: “Se vi faros ĝuste, la merito estos via. Se vi faros eraron, la kulpo mia.” Li diris, ke iam li povas solvi problemon nur per kelkaj vortoj, sed liaj subuloj devas klopodi du tagojn por ĝin solvi.

“Tiukaze mi preferas lasi la aferon al ili,” diris Wu, “por ke pli multaj memstare faru la laboron.”

Ĉiutage post laborhoroj, de la 5-a ĝis la 6-a vespere, li restas en sia kabineto. Tiam vicurbestroj aŭ estroj de administrejoj de la urbo domo povas konsiliĝi kun li pri io aŭ alio. Se neniu venas al li en tiu tempo, li do mem legas. Al li plaĉas verkoj de tri kategorioj: libroj pri pensfluo, kiaj tiuj de Sigmund Freud kaj Jean-Paul Sartre; noveloj de verkistoj de Shenyang; kaj mondfamaj verkoj. Li legas ankaŭ bildlibrojn kaj popularajn legaĵojn. Li diris: “Mi devas scii, kion legas junuloj, maljunuloj kaj infanoj.”



Lin interesas multo. En 6 jaroj li studis la ĉinan lingvon, historion, filozofion k.a. Li ŝatas romanojn kun teoria koloro. Li havas fortan intereson ankaŭ pri poezio kaj muziko.

Eble ĝuste pro sia aparta travivaĵo li ne turnas grandan atenton al la rango de urbestro, sed kun granda entuziasmo laboras kiel popola servanto.

“Estas ne facile bone labori kiel popola servanto,” malkaŝe li diris. “Antaŭ ĉio, li devas mem doni ekzemplon en ĉio, bone rilati kun la popolanoj, prizorgi ilin, elteni ĉian provon kaj, due, liaj faroj devas esti komprenataj de la popolo.”

Ĉiutage Wu pasigas la tempon en jena maniero: laboro ĉe la tablo, enketo inter la popolanoj kaj legado okupas po 1/3 de la laborhoroj.

“Mi ne ŝatas iri kun multaj sekvantoj.” Li neniam anticipe sciigas entreprenojn, kiujn li inspektos. En la inspekto lia sekvanto estas nur lia sekretario. Li ofte babilas kun laboristoj, kamparanoj kaj malsupraj funkciuloj unu aŭ du horojn en iliaj hejmoj por koni la publikan opinion kaj problemojn el diversaj sociaj tavoloj.

“Kiom da aferoj kontentigaj al la urbanoj vi faris post via urbestriĝo?” mi demandis.

“Ĝenerale dirite, mi ne respondas tian demandon,” kun rideto li respondis. “Mi ne emas promesi kelkajn aferojn por plaĉi al la publiko tuj post urbestriĝo. La socio estas unu tuto. Se ni faras nur kelkajn aferojn, certe okazos komplikaĵo.”

Li opinias, ke en la socio, kie la produktaj fortoj estas malgrandaj, loĝantoj grandnombraj kaj neriĉaj, la fundamenta principo por vekti la popolan aktivecon estas garantii stabilecon de la popola vivo.”

“Ni devas fari ĉion eblan por kontentigi la bazajn bezonojn de la popolanoj,” Wu diris. “Se mankas al ili legomoj, ni devas klopodi por akiri kaj liveri ilin. Se mankas al ili kokoj, ovoj, fiŝoj kaj ceteraj, ni devas klopodi por kontentigi la bezonojn.”



Urbestro Wu Disheng

Li estas kontenta pri la agrikulturo de Shenyang. Shenyang havas nur du antaŭurbajn guberniojn, sed ili fundamente kontentigas la urbanojn per legomoj, viandoj, ovoj, kortobirdoj, fiŝoj kaj grenoj. “En nia lando 8 kamparanoj vivtenas unu urbanon, dum en Shenyang unu kamparano 10 urbanojn,” Wu diris.

## VIVI INTER LA URBANOJ

Wu Disheng loĝas en ordinara domo. Inter liaj najbaroj estas laboristoj, kamparanoj kaj oficistoj.

Wu tenas intiman rilaton kun ili. Lin ofte vizitas la najbaroj. Tuj memvole funkcias kiel liaj volontuloj-akceptantoj. Kelkfoje oni petas lin pacigi kverelantajn geedzojn.

Li ne konsentis, ke mi kaj aliaj raportistoj intervjuos lin en lia hejmo. “Kial intervjui min en mia hejmo? Ŝajnas, ke mi estas kurioza besto,” humure li diris. Tamen, li konigis al mi siajn familianojn.

“Mi havas 2.5 plus 0.5 infanojn,” li ŝercis. “La 0.5 estas filino de mi kaj mia eksedzino. Nun ŝi loĝas en Hongkong. La alia 0.5 estas infano de mia bofrato. Tuj post lia naskiĝo lia patrino mortis pro puerpera infekto. Mi prenis lin en mian hejmon, kiam li estis 2-monata. Nun li lernas en mezlernejo. La aliaj du estas filoj de mi kaj mia

edzino, kiu dividis kun mi malfeliĉon kaj mizerojn. Ili ambaŭ finis sian universitatan studon kaj laboras en konstruejo. Oni intencis doni al unu el ili laboron en iu instituto post la diplomitiĝo. Mi flamiĝis pro tio. “Kion li povas fari sen konstruejo? Lia fako ja estas arkitekturo!” Tial lia filo devis nur obei sian patron.

La familio de Wu ja estas sufiĉe malriĉa. La emerita enspezo de lia edzino estas nur 30 juanoj. Es-tante urbestro, Wu Disheng enspezas ĉiumonate nur iom pli ol 200 juanojn. “Mia edzino estas ŝparema,” li laŭdis. “Ŝi ofte aĉetas malmultekostajn legomojn. Foje ŝi aĉetis por 45 juanoj paron da sofoj kaj unu tableton. Sufiĉe malmultekostaj!

Ankaŭ Wu mem estas ŝparema. Li fumas malmultekostajn cigaredojn. “Mia edzino donas nur tiom malmulte da mono,” duonŝerce li diris.

La modesta vivo ja estas nenio por Wu Disheng. Li havas sian apartan ĉagrenon. Antaŭ sia urbestriĝo ĉiudimanĉe li mem aĉetis legomojn. Nun, vidinte la urbestron sur strato, multaj salutas lin kaj interparolas kun li pri tio aŭ ĉi tio. Kaj sekve de tio, li ne sukcesas aĉeti legomojn. Li diris: “Ankaŭ tio estas malgranda ĉagreno por mi. Kial mi ne havas liberon kiel ordinaraĵo urbanoj?” ■

# Animbela persono, animbela lingvo

— Omage al la 130-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof

de ZHANG QICHENG

ESTAS sentenco de la antikva helena filozofo Platono: Oni devas ellerni taksi animan belecon pli kara ol figura beleco. La kreinto de nia lingvo Zamenhof ja estis tia animbela persono. La verkinto de lia biografio Edmond Privat skribis: Li kondutis “bonkore, pure, modeste, helpeme, ofere, mirinde pacience kun ĉiuj, neniam ofende per ago aŭ parolo kontraŭ iu ajn, ĉiam simpatie aŭskulteme al ceteraj homoj, eĉ al tedaj...” Li estis tiel bonkora homo, sekve li amis popolon laboreman kaj preferis loĝi en kvartaloj ĝiaj for el mondana societo. Li, kiel okulkuracisto, preferis vivi sian simplan kaj malriĉan vivon ol preni altan pagon kiel aliaj kuracistoj. Kiam li kuracis okulmalsanon por lacegaj laboristoj kaj palaj laboristinoj, li prenis de ĉiu nur 40 kopekojn, iam eĉ neniun groŝon.

Estas pli admirinde, ke lia bela animo jam leviĝis al amo al la homaro. Li opiniis, ke nacioj kun malsamaj lingvoj kaj malsamaj kredoj ne devas malami unu alian, sed devas ami unu alian, vivi egale kaj pace por kune fondi pacan mondon.


Tia amo naskis en li belan idealon — rompi la lingvan muron, kiu malpermesas al la nacioj komuniĝi inter si, kaj krei internacian komunan lingvon por ili, kiu povas interkomprenigi la diversnaciajn popolanojn de la mondo kaj amigi ilin reciproke por formi grandan familion de la homaro, kaj ĉiu homo estas nur membro de la familio. Plej bone prezentis la idealon lia parolo en la Unua Kongreso Esperantista:

“En nia kunveno ne ekzistas nacioj fortaj kaj malfortaj, privilegiitaj kaj senprivilegiaj, neniuj humiligaĵoj, neniuj sin ĝenas; ...ni ĉiuj estas plene

egalrajtaj; ni ĉiuj sentas nin kiel membroj de unu nacio, kiel membroj de unu familio; ...kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj...”

Li tutforte sin donis al la kreado de internacia komuna lingvo, kiu “devus esti tuj lernebla kaj uzebla de la popoloj mem”. Li finis la manuskripton. Por perfektigi sian kreaĵon, dum ses jaroj li laboris ĉiutage, bonigante kaj provante sian lingvon. Li ĉagreniĝis, se li trovis ian nefluecon de sia lingvo, kiam li provis verki aŭ traduki en tiu lingvo.

Dank’ al la penado kaj polurado de Zamenhof, finfine prezentigis al la mondo Esperanto, kiu estas belsona, simpla, facile lernebla, logika kaj viveca. Kaj tiu lingvo havas, krom forma beleco, ankaŭ animan belecon. Fakte, lingvo estas nur ilo por interŝanĝi sentojn, por ĝi ne eblas havi animon kiel homoj, por ne paroli pri beleco de animo. Tamen, Esperanto diferencas de la aliaj lingvoj, ĝi havas animan belecon, t.e. ĝia kreinto enverŝis sian amon al la hom-



D-ro L. L. Zamenhof

aro en tiun lingvon kaj formiĝis ĝia “interna ideo”.

Oni povas diri, ke Zamenhof donis sian atenton kaj entuziasmon al tiu idealo pli, ol al Esperanto mem. Ĝuste pro tio, kiam iuj lin konsilis, ke Esperanto evitu ligi esperantismon kun ia ideo, nia majstro, ĉiam modesta kaj multepacienca, ekkriis indigne:

“Ho, kiaj vortoj! ... Ho, ne, ne, neniam! Kun energia protesto ni forĵetas tiun ĉi postulon. Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion



idean, ni indigne dissiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni neniigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forjetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios kun abomeno: 'Kun tia Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!'" (el la parolado de Zamenhof ĉe la Dua Kongreso Esperantista). Kiel forte indignaj vortoj!

Dum cent jaroj Esperanto disvastiĝis en pli kaj pli multaj lokoj de la mondo, plaĉis al pli kaj pli multaj homoj, ne nur pro sia simpleco, beleco kaj praktika valoro, sed ankaŭ pro la alta idealo entenata de ĝi. De pasintece ĝis nun, multe da personoj sin dediĉis al la Esperanta laboro kaj prenis disvastigon kaj uzadon de Esperanto kiel sanktan aferon. Ilia movforto kuŝas en tio, ke Esperanto ne nur estas lingvo, sed ankaŭ idealo. Ĝuste kiel Zamenhof diris: "Ĉiuj ŝatis Esperanton ne tial, ke ĝi alproksimigas la cerbojn de la homoj, sed nur tial, ke ĝi alproksimigas iliajn korojn."

Ĉinio estas socialisma lando. Nia idealo estas komuna en multaj flankoj al la idealo de Esperanto. Ni kredas je internaciismo, en kiu regas granda harmonio inter la popoloj tra la mondo, pledas por egaleco inter la landoj ĉu grandaj ĉu malgrandaj, observas la Kvin Principojn de Paca Kunekzisto, oponas kontraŭ agreso kaj hegemoniismo kaj defendas la mondpacon. Ĉu ĉion ĉi tion ne celas Esperanto? En la 30-aj jaroj kaj la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito ni per Esperanto batalis kontraŭ la agreso de Ĉinio far la japana imperiismo, proksimigis nian koron kaj tiun de diverslandaj esperantistoj, kiuj amis pacon kaj kontraŭstaris al nacia subpremado, kaj akiris bonan efikon. Tio plene montris, ke la idealo de Esperanto estas konforma al nia afero por nacia liberigo. Nun, ankaŭ niaj reformo kaj pordmalferma politiko kaj la politiko trakti egale kaj amike ĉiujn landojn konformas al la idealo de Esperanto — plifortigi interkomprenon kaj amikecon inter diverslandaj popolanoj. Tial, la idealo de Esperanto ĝuste estas ĝia propra avantaĝo, kiun ne havas la aliaj lingvoj.



D-ro Zamenhof kaj lia edzino

Kompreneble, Esperanto, kiel lingva komunikilo, devas kiel eble plej bone disvolvi sian praktikan rolon, por ke la homoj konu ĝin, nur tiam ĝi povos enradikiĝi en la reala vivo. Tamen, ni neniel devas forĵeti ĝian altan idealon, ĉar forĵeti ĝian idealon signifas forĵeti ĝian avantaĝon super la aliaj lingvoj. Same, ni esperantistoj neniel devas rigardi nin mem kiel personojn posedantajn nur

iun lingvon, aŭ ordinarajn lingvistojn, sed devas konscii, ke ni estas batalantoj por la alta idealo! Ni devas havi ne nur ordinaran laborferoron, sed ankaŭ sindonemon al la sankta afero.

Ni devas lerni de Zamenhof lian konduton, kaj pli grave, daŭrigi kaj disvolvi lian spiriton por firme kaj senlace batali por la idealo. ■

# Xichang, vidindejo en suda Sichuan

Teksto de XU YE kaj WANG QINGHUA

Fotoj de XU JINYAN

**L**A ondanta Daliang-montaro situas en la norda parto de Hengduan-montaro ĉe la orienta Qinghai-Tibeta Altebenaĵo. Ĝi, 2 000-2 500 m super la marnivelo, etendiĝas de norde suden je centoj da lioj (1 lio = 0.5 km). En la montaro la silka vojo serpentas suden, kiel multaj riveretoj. Trapasinte la antikvan urbeton Taideng (nun Lugu), ĝi eniras ebenaĵon sur altebenaĵo, kie estas Xichang (Ŝjiĉang), la ĉefurbo de la Liangshan-a Ji-nacieca Aŭtonoma Subprovinco.

## ANTIKVA URBO XICHANG

Xichang, ĉarma antikva urbo sur la Suda Silka Vojo, estis sidejo de la antikva Qiongdu(Ĉjongdu)-regno. En Han-dinastio (206 a.K.-220 p.K.) ĝi estis Qiongdu-gubernio kaj en Tang-dinastio (618-907) Juanzhou(Ĝjüangöu)-prefektujo. La loko estis grava pasejo por interkomunikigi la popolanojn de la landinterno kun tiuj de la sudokcidenta regiono, kaj estis ankaŭ trafika pasejo, kie la antikva Lingguan-vojo iras suden al Yunnan kaj norden al Sichuan. Dum dumil jaroj la homoj, kiuj iris kaj reiris sur la Suda Silka Vojo, tie ripozis, faris negocon, ĝuis la pejzaĝojn aŭ spertis la vivon de loĝantoj.

Xichang estis plurfoje rekon-

struita. Nun, ĉe la norda deklivo de la nova urbo de Xichang oni povas vidi altajn antikvajn urbomurojn kaj larĝajn trairejojn de urbopordoj. La kvar urbopordoj estas nomataj Anding-pordego, Ningyuan-pordego, Datong-pordego kaj Jianping-pordego. Bedaŭrinde, Ningyuan-pordego estas malkonstruita. En la trairejoj videblas rigliloj. Sur la malnovaj stratoj de la antikva urbo funkcias multaj butikoj kaj svarmas pasantoj.

Ji-a virino

Xichang nomiĝis Qiongdu en la antikveco. "Du" en la ĉina lingvo signifas "grandan urbon" aŭ "centran urbon". Tamen, la lokoj kun la nomo "du" apude de la antikva vojo estis nur poŝtstacioj aŭ urbejoj. Kial oni nomis ilin "du"? En malgranda restoracio proksime de la urbo Xichang, ni vidis 4-5 junulojn havantajn felton sur si. Ili gaje trinkis el la sama vinkruĉo. Kiam ni petis, ke ili montru la prononcon kaj sencon de "du", ili detale klarigis al ni, ke en la ji-a







Qionghai en mateno

Torça festo en nokto



lingvo parolata en Liangshan-regiono, la vorto "du" signifas "piedpremon" kaj "rektan vojon". Poste, ankaŭ ji-oj de la Ji-lingva Projekta Grupo de Yunnan konigis al ni, ke la vorto "du" en la ji-a lingvo de Yunnan signifas "paŝadon", "spuron" kaj "eldomiĝon". Nun, preskaŭ laŭ la tuta antikva vojo Lingguan loĝas ji-oj. Iuj gravaj poŝtstacioj titolitaj per "du" rilatas ĝuste al tio.

## LA FIŜISTA VILAĜO ĈE QIONGHAI-LAGO

La plej ĉarma en Xichang estas la fiŝista vilaĝo ĉe Qionghai, kiu estas malfermita al turistoj en-kaj eksterlandaj.

La lago, kun totala areo de pli ol 30 kvadrataj kilometroj kaj la plej granda profundo de 34 metroj, en formo de kalabaso, situas je 5 km sudoriente de la urbo Xichang. Tie abundas fiŝoj kaj salikokoj. En matena nebulo ni veturis per mallarĝa boato al insuleto en la centro de la lago. Niaj remiloj dividis ondetojn en zefiro kaj ni refreŝiĝis de tio. La maljuna

fiŝisto konigis, ke nun vivas pli ol 5 000 loĝantoj en la malgranda fiŝista vilaĝo sur la lago, kiuj ĉiuj estas han-oj. Laŭdire, ili estas posteuloj de ekzilitaj armeanoj. Ili diris, ke iliaj antaŭuloj transloĝiĝis tien de Fujian (Fuĝjan), sudorienta Ĉinio.

Ĉe la bordo ankriĝis multaj plezurŝipoj kaj la unuaj turistoj jam estis tie. Sur la plaĝo staris buntaj sunombreloj. Sub la sunombreloj estis vendejoj de manĝaĵoj. Tie vendiĝis frititaj salikokoj kaj blankaj fiŝetoj. Tie ni gustumis ankaŭ freŝajn krabojn. Maljunuloj apud manĝaĵ-budoj vendis cigaredojn kaj sukeritajn rizgrajnojn en korboj. Kaj knabinoj, plektante fiŝreton, vendis teon.

Ni sidiĝis ĉe la lago, gustumis akvoproduktaĵojn kaj rigardis sampanojn rapide veturantaj tien kaj reen sur la akvo. La sampanoj dividis sennombrajn ondetojn, kio plibeligis Qionghai-lagon. En alia turisma punkto vilaĝanoj metis sur dekojn da ĉevaloj ruĝvelurajn selojn kaj servis ilin al turistoj ĉe la lago.

Sudokcidente de Qionghai-marĉo estas Lushan-monto kovrita de arboj. En la templo Guangfu sur la monto konserviĝas pli ol 150 steleoj pri tertremoj okazintaj en Xichang dum la periodo de la dinastio Ming (1368-1644) ĝis la dinastio Qing (1644-1911). Ili estas unikaj tiurilate en Ĉinio. Rigardante steleon kaj legante surskribon sur ĝi, vi sentus, ke la tero sub viaj piedoj tremas. Fakte, Qionghai-lago formiĝis de tertremoj.

Inter la ombraj pinoj de Lushan staras konstruaĵo en ji-nacieca stilo, la Muzeo de la Ji-nacieca Sklava Socio de Liangshan. Ĝi detale konigas la historion de la Liangshan-a sklava sistemo kun originalaj trajtoj.


## BOSHIWAHEI

En Wanchanggou (Ŭanĉanggoŭ) de Zhaojue (Ĝaŭĝjue)-gubernio de la subprovinco sin trovas ŝtongravuritaj bildoj, kiujn la lokaj ji-oj nomas "Boshiwah-ei". Ĝi ji-lingve signifas serpentkavernon, bildokavernon aŭ bildaron.

Tiuj bildoj estis faritaj en la dinastioj Tang kaj Song (618-1279). Kiuj estis la gravurintoj? Iuj opiniis, ke ilin gravuris dungitaj metiistoj de Nanzhao(-Nanĝaŭ)-regno, aliaj opiniis, ke ili estis faritaj de alilokaj bonzoj, triaj opiniis, ke la gravurintoj estis nacimalplimultanoj, kiuj adoris budhismon kaj alte taksis la landinternan kulturon.

La bildoj dislokiĝas sur 16 grandaj rokoj sur montodeklivo, kun totala areo de ĉ. 400 kvadrataj metroj. Ili estis faritaj en intajlo kun Tang-dinastia stilo. Ilia enhavo estas tre riĉa.

Antaŭ la grandnombraj bildoj ni sentis, ke tiajn ni iam vidis. Inter ili estas bildo, sur kiu estas gravurita elefanto pli ol 2 m alta, kun nuda infaneto sur sia rostro-





pinto. Ĝis nun en iuj turismaj lokoj de sudorient-aziaj landoj oni sidas sur rostro de elefanto por sin foti. Tial, probable la bildo estas farita imite al tiu prezentita de hinda bonzo.

Tie troviĝas ankaŭ la bildo de la Nanzhao-regna reĝo en inspektado. La aranĝo de la homfiguroj kaj vestoj kaj la impona atmosfero preskaŭ similas al tiuj de la statuo de "Nanzhao-regna reĝo Geluofeng en inspektado" en la groto de Jianchuan de Yunnan. La nura diferenco inter ili estas, ke la antaŭa estas ŝtongravurita kaj la lasta skulptita.

Xichang estas trafika arterio. Dank' al tio, la tiea kulturo sin karakterizas per indigeneco kaj kunfandiĝo de la kulturo de Sichuan kaj Yunnan, kaj samtempe estas influata de la landinterna kaj fremda kulturoj. La arta trezoro "Boshiwahei" ĝuste atestas, ke neniam interrompiĝis la kultura interŝanĝo inter la naciecoj de sudokcidenta Ĉinio, inter ili, landinterno kaj najbaraj landoj.

## TORĈOFESTO

En la sudokcidenta regiono multaj nacimalplimulto havas Torĉofeston. La plej grandioza estas tiu de ji-oj en la Liangshan-a Ji-nacieca Aŭtonoma Subprovinco.

Oni havas Torĉofeston ĉiujare, kiu oficiale komenciĝas de la 24-a de junio laŭ la luna kalendaro kaj daŭras tri tagojn. Antaŭvespere de la festo ji-oj buĉas ŝafojn kaj bovojn, gaje dancas kaj kantas. En la festa tago ili el diversaj montvilaĝoj kolektiĝas sur ebenejo. Ĉe la kampfajro la knabinoj, en longa jupo kaj kun tintantaj orelingoj, blovas per bronza buŝharmoniko, dum la knaboj, kun hartubero sur la kapo kaj blanka-nigra ŝaflana felto sur si, gaje ludas kordinstrumenton.

Pri la origino de Torĉofesto



Skulptaĵo en Xichang

Enirejo de Xichang



ĉirkulas multaj legendoj. Oni diras, ke antaŭ tre tre longe la ĉiela reĝo sendis la plej ferocan estaĵon al la homa mondo por kolekti grenon kaj monon. La ji-oj elektis Ati Laba por batali kontraŭ la estaĵo. Ili luktis naŭ tagojn kaj naŭ noktojn kaj fine li mortigis la estaĵon. La ĉiela reĝo eksplodis de kolero kaj ellasis "ĉielajn insektojn" por detrui grenplantojn. La ji-oj eklumigis torĉojn por brulmortigi la insektojn. Post tri tagoj kaj tri noktoj la insektoj ĉiuj estis mortigitaj de la brulo, kaj la plan-

toj saviĝis. Ekde tiam ji-oj en tiu tago de ĉiu jaro buĉas ŝafojn kaj bovojn, kaj nokte lumigas sen-nombrajn torĉojn por festi la venkon.

Hodiaŭ, tiu tago estas ne nur festo por la lokaj diversnaciecaj popoloj, sed ankaŭ grandioza foiro. Dum la festo ili interŝanĝas bezonaĵojn, faras amikajn kontaktojn kaj per tio ricevas diversajn informojn. Ĉio ĉi vigligas la antikvan vojon. ■




Sur strato en Xichang


Ŝtongravurita bildo pri inspektado de la reĝo de Nanzhao-regno







Amatoroj




Junaj lamaoj

## Labuleng-templo

Fotoj de SUN YI

La nomita templo kuŝas en Xiahe-gubernio, Gansu-provinco. Konstruita en 1710, ĝi estas ĉefa templo de Gelu-sekto de la tibeta budhismo. En ĝi konserviĝas granda nombro da sutroj kaj materialoj pri la tibeta historio. La tieaj lamaoj ne nur studas sutrojn kaj okupiĝas pri religiaj aktivadoj, sed ankaŭ faras produktadon. Al la templo ofte pilgrimas ankaŭ adeptoj el najbaraj provincoj kaj regionoj.

Labuleng-templo



## KONTRIBUU POR LA RUBRIKO "MI KAJ ĈINIO"

Karaj legantoj

Por festi la 40-jariĝon de EPC en la venonta majo, ni petas vian kontribuon por la rubriko "Mi kaj Ĉinio".

Vi povas verki pri: impresoj pri Ĉinio, amika kontakto kun ĉinoj aŭ ĉinaj esperantistoj, amikeco kun EPC ktp. Via artikolo povas esti en ajna stilo aŭ formo, sed ne pli-ol-tri-paĝa (laŭ la formato de EPC). Bonvenaj estas koncernaj fotoj (inkl. de portreto de la aŭtoro). Limdato: la 31-a de januaro 1990 (laŭ vialoka poŝtstampo).

Ni aperigos bonajn verkojn el la kontribuoj en EPC. Ni aljuĝos la unuan premion al 1, duan premion al 3 kaj trian premion al 5 kontribuintoj. La premioj estos ĉinaj metiartaĵoj. Nepremiitaj kontribuintoj ricevos donaceton.

La rezulto de la aljuĝo legiĝos en la 6-a numero de 1990.

Ni anticipe dankas vin por la kunlaboro.

La Red.

# Huancheng-urbeto

Teksto de HOU JUELIANG

Fotoj de YAN JIN

**C**E la bordo de Weishan-lago, suda Shandong-provinco, sidas Huancheng-urbeto kun historio de pli ol 3 000 jaroj.

Han Xingjiang, la urbetestro, informis al mi, ke Huancheng estis malriĉa loko, ĉirkaŭita de kamparo, kun 70 000 loĝantoj. En

la lastaj jaroj pro ekspluato kaj utiligo de Weishan-lago Huancheng ekhavis fortunon. Ĝi fariĝis grava karboproduktejo. Ĉe la lago latentas bonkvalita karbo kaj ĝia ekspluato stimulis la lokan trafikon. Tie la loĝantoj estas multaj dum agraroj malmultaj. Iuj el la superflujaj laborfortoj do aĉetis kamionon kaj ekokupiĝis pri karbotransportado. Tial ili riĉiĝas tagon post tago. Post kelkaj jaroj kamparanoj el 18 vilaĝoj de la urbeto havigis al si entute pli ol mil aŭtojn. Kaj aperis 8 "aŭto-vilaĝoj". Preskaŭ en ĉiu vilaĝo troviĝas familioj, kiuj ĉiujare enspezas po pli ol 10 000 juanojn. Nun troviĝas ankaŭ iuj familioj, kies jara enspezo superas cent mil juanojn kaj eĉ kelkcent mil juanojn.

Mi vizitis Buĵia-vilaĝon proksime de la urbeto. Ĝi estas fama "aŭto-vilaĝo". Matene tuj ĉe la sunleviĝo aŭdiĝis bruado de pli ol

En trikejo





60 kamionoj, kiuj estas pretaj sin ŝargi per karbo kaj veturi malproksimen. Jen emocia sceno aparta en la aŭto-vilaĝoj.

Sen riĉiga rimedo Bujia-vilaĝo estis malriĉa dum longe. Post starigo de karbominejo, 4 kamparanoj kune aĉetis traktoron kaj la unuaj ekokupiĝis pri transportado. Dank'al tio ili multe pliigis sian enspezon. Enviaj, ankaŭ aliaj kamparanoj kolektis monon, aĉetis kamionon por sin okupi pri la transportado. Post 4 jaroj plejparto de la familioj de la vilaĝo havas kamionon sian propran aŭ akcian. Tiel la tuta vilaĝo ekiris sur riĉigan vojon.

En la vilaĝo viroj okupiĝas pri transportado kaj virinoj ekfunkciigis trik-fabrikon. Pli ol 200 trikistinoj produktis belajn lavtukojn kaj krispajn littukojn. Ili mem serĉas la materialojn kaj merkatojn, dank' al kio la produktado iras glate.

Dank' al prospero de la flankaj okupoj, la vilaĝo pliigis sian komunan akumulan fonduson kaj ekfunkciigis bonstatigajn entreprenojn. En la vilaĝo stariĝis lernejo. Ĉiuj junaj vilaĝanoj lernis en mezlernejo kaj nun ne plu troveblas analfabetoj. La maljuna generacio deziras elkulturi studentojn de sia propra vilaĝo, sed bedaŭrinde, ĝis hodiaŭ neniu junulo sukcesis en la enira ekzameno por altlernejo.

Pro respekto al la maljunuloj la vilaĝanoj donas al senfil(in)aj maljunuloj sufiĉan monon por ilin vivteni. En la antikva Ĉinio ekzistis bela socia idealo: "La maljunuloj ĝuu komforton kaj la infanoj estu bone prizorgataj." En la antikveco tiu idealo fakte estis fantazia, sed hodiaŭ ĝi realiĝis en Bujia-vilaĝo.

Adiaŭinte la "aŭto-vilaĝon", mi venis al bredejo ĉe la bordo de Weishan-lago. Tie sterniĝas senlima plaĝo, tre simila al stepo. En tiu verda mondo kreskas fragmi-



La aŭtoro (dekstre) en Huancheng

toj, herboj kaj plantaĵoj. Sub la lazura ĉielo grasaj bovoj kaj ŝafoj senĝene promenas, manĝas freŝajn herbojn. Vespere, subiras la suno, blovetas zefiro kaj antaŭ mi kvazaŭ aperus Cile-ebenaĵo.

*Sub la ĉielblu' sen baro  
La paŝtejo vasta kiel maro,  
Kiam vent' klinigas herbojn,  
Ekaperas bovoj kaj  
ŝafoj en aroj.*

S-ro Sun, la bredejestro, informis min, ke tiu bredejo estis fondita en la komenco de la 80-aj jaroj kontraŭ kelkcent mil juanoj investitaj de la ŝtato. Funkcias 4 similaj bredejoj ĉe Weishan-lago. Sun diris, ke la laboro en la bredejo estas peniga. La tieaj laborantoj preskaŭ ne havas feriajn tagojn: Ili paŝtas matene kaj vespere, ter-kulturadas tagmeze kaj krome ili devas zorgi pri anasaro kaj purigi bovstalon. Malgraŭ la peniga laboro ili estas ĝojaj de la laboro, ĉar ili enspezas pli kaj pli multe, dank' al la bona ekonomia efiko de la bredejo. Sun diris plu, ke tie oni malmulte elspezas por manĝaĵoj: la greno kaj legomoj estas kulturitaj de ili mem. Tion dirante, li deprenis du melonojn kun strioj, ilin lavis, tranĉis kaj proponis al mi. La melono estis bongusta, fragila kaj sukoriĉa. Vidinte, ke mi manĝas kun granda

ĝuo, li ekradiis de ĝojo.

Reveninte en la urbeton, mi vizitis Zhang Maohua, direktoron de kinejo. Li, plenkreska kun pure blanka vizaĝo, estas homo serena. Li torente paroladis eĉ antaŭ nekonatoj. Antaŭ sia direktoriĝo li mem entreprenis hotelon kaj ankaŭ okupiĝis pri transportado. Tiam ĉiutage li enspezis 200 juanojn. Sed, li preferas esti direktoro ol riĉulo. Nun lia monata salajro estas malpli multa ol lia antaŭa unu-taga enspezo. Li opiniis, ke la homoj vivas ne nur por mono kaj materia ĝuo, sed ankaŭ kaj, eble ĉefe, por idealo. Li diris, ke projekcii filmon povas riĉigi la enhavon de la kultura vivo de la kamparanoj, ilin plezurigi kaj inspiri, tial la laboro estas nemankigebla.

Tamen, estis malfacile entrepreni kinejon en Huancheng. Tre malmultaj homoj vizitis la kinejon. Pro tio la kinejo enspezas malmulte. Riĉiĝinte, tie ĉiuj familioj havas televidilon, multaj havas ankaŭ videoregistratoron, tial ili preferas rigardi televidajn programerojn hejme ol viziti kinejon.

Por ke pli multaj vizitu kinejon, Zhang alte taksis afiŝojn. Iajfoje li eĉ vendis biletojn ĉe la hejmo de la kamparanoj kaj pro-



Kamionoj ŝarĝotaj

jekciis filmojn en fiksitaj lokoj, tio multe faciligis al la kamparanoj rigardi novajn filmojn. Dank' al lia penado, la enspezo de la kinejo iom post iom plimultiĝis. Por pliigi la enspezon de la kinejo Zhang funkciigas brodejon en liberaj ĉambroj de la kinejo, dank' al tio solviĝis la problemo pri laborigo de iuj knabinoj kaj familianoj de la laborantoj.

Mi revenis en Pekinon, sed la fizionomio de la aŭto-vilaĝo, bredejo kaj kinejo ofte aperas en mia memoro. Mi deziras, ke mi refoje vizitu Weishan-lagon kaj pli multe raportu pri Huancheng-urbeto. ■




Zhang Maohua en la brodejo

Paŝtejo ĉe la lago





# Bredado de maraj estaĵoj en Qingdao



Bredejo de salikokidoj

**I**UN someran matenon mi venis al akvoproduktaĵa foiro de Qingdao (Ĉingdaŭ), kie regis granda bruo kaj vicleco. Iu maljunulo kun kamparana aspekto laŭte kriis: "Aĉetu ezokojn, freŝajn kaj malkarajn!" Tuj ĉirkaŭis lin multaj homoj. Enpremiĝinte en la homamason, mi vidis du korbojn plenajn de freŝaj fiŝoj glimantaj. Mi babilis kun li kaj informiĝis, ke li laŭkontrakte bredas fiŝojn en basenoj de 0.4 hektaro. La vendataj fiŝoj estis elakvigitaj fruma-

tene. Tion dirinte, li kriis denove.

Mi sekvis la homfluon en la foiron. Mi trovis, ke tie la akvoproduktaĵoj estas tre abundaj: ezokoj, ĉang-fiŝoj (*Stromateoides argenteus*), rubandfiŝoj, sepioj, salikokoj, holoturioj, anadaroj (*Anadara*), laminario kaj diversaj aliaj sekigitaj marproduktaĵoj. Mi tre enviis Qingdao-anojn loĝantajn ĉe la maro, ke ili povas mangi tiel multajn marproduktaĵojn.

## ZORGO PRI LA EKVILIBRO DE MARA EKOLOGIO

Qingdao situas en la orienta parto de Ĉinio, ĉe la Flava Maro. Ĝi havas marbordon de pli ol 730 km kun multaj insuloj, golfoj kaj vasta malprofunda etendaĵo taŭgaj por bredi fiŝojn, salikokojn, ostrojn kaj algojn.

La rezervokvanto de marproduktaĵoj ja havas limon. En la lastaj jaroj Qingdao kiel multaj aliaj

La tri-tavola bredejo



marbordaj regionoj de Ĉinio akiris pli kaj pli da marproduktaĵoj, tamen pro la polucio de marakvo kaj fiŝado en komba maniero multe reduktiĝis kaj preskaŭ malaperis la grandaj kaj malgrandaj ŝtonkapaj fiŝoj, sepioj, rubandfiŝoj kaj aliaj bonkvalitaj fiŝoj ŝatataj de la popolo.

Tial la problemo pri la ekvilibro de mara ekologio vekis pli kaj pli grandan atenton ĉe la Qingdao-anoj. Koncernaj administracioj aplikis respondajn rimedojn, unuflanke limigi fiŝadon kaj aliflanke plenenergie disvolvi fiŝbredadon por savi la detruatan naturan rezervon. Ekde 1984 la kvar fiŝidaj stacioj sub la Urba Akvoproduktaĵa Buroo ĉiujare formetas en proksiman maron 300 milionojn da salikokidoj mallonge migrantaj kun alta ekonomia valoro, por ke ili kresku en natura medio, kaj samtempe protektas kaj prizorgas ilin. Tio evidente pliigis la produktan kaj reproduktan kvantojn de salikokoj. En la aŭtuno de la pasinta jaro fiŝkapta motorŝipo de fiŝisto Yang Youxing (Jang Joŝing) de Liuting-urbeto de Laoshan-gubernio rete elakvigis en 40 tagoj 5 330 kg da salikokoj en la maro, kien oni formetis salikokidojn. La rikoltitaj salikokoj valoris pli ol 200 000 juanojn. Li diris al mi, ke antaŭ la formetado tiel granda kapta kvanto estis neimagebla.

Pro la ĉiam kreskanta bezono de la popolo pri bonkvalitaj marproduktaĵoj la Qingdao-a Akvoproduktaĵa Buroo sendis du fiŝŝipojn, ekipitajn per avangardaj savinstalaĵoj kaj satelite gvida sistemo, tra la Suda Ĉina Maro, Hindia Oceano, Ruĝa Maro kaj Mediteraneo al la Atlantika Oceano ĉe la Okcidenta Afriko por fiŝado. Kvankam la oceana fiŝado estis pli malfacila ol la proksim-mara fiŝado kaj la kosto pli granda, tamen la du fiŝŝipoj kaptis en 1988 jam pli ol 800 tunojn da sparoj (*Sparus macrocephalus*), ŝtonkapaj fiŝoj kaj rubandfiŝoj ĉe la Okcidenta Afriko. Tiuj fiŝoj kun delikata karno kaj malmultaj ostoj trovis ŝaton ĉe ĉinaj klientoj.

## BREDEJOJ DE AKVOPRODUKTAĴOJ

Jam en la kvindekaj jaroj tieaj fiŝistoj komencis kulturi laminaron. Estas kompare perfektaj iliaj teknikoj en kulturado kaj divido de ĝiaj plantidoj kaj prilaborado. En la lastaj jaroj oni praktikis en Qingdao reformadon de produktaĵo kaj vendo. En la kamparo oni disdonis al kamparanoj kaj fiŝistoj basenojn kaj marprofundaĵon por laŭkontrakta entreprenado, kaj samtempe oni malfermis merkaton, abolis la malnovan metodon de unuigitaj aĉetado kaj vendo fare de la ŝtato kaj permesis liberan komercon de akvoproduktaĵoj laŭ merkataj prezoj. Tio multe levigis la aktivecon de la bredantoj kaj akcelis la disvolviĝon de la urba fiŝproduktado. En 1980 la urbo akiris 38 000 tunojn da akvoproduktaĵoj, sed en 1988 jam 92 000 tunojn.

En la sekvanta tago mi venis al la vilaĝo Zhougezhuang (Ĝouĝeĝuang) de Jimo(Ĝjimo)-gubernio norde de Qingdao por viziti ĝian salikoko-bredejon.

La salikoko-bredaj basenoj troviĝas ĉe maro proksime al la vilaĝo kaj estas protektataj de longa digo. Ekstere estas senlima maro kaj interne — ebenaj kaj kvietaj basenoj. Malgrandaj digoĵoj dividis la bredojn en dekojn da salikokaj basenoj. Vilaĝestro Liu Dongxiao (Liŭ Dongŝjaŭ) diris al mi, ke elekto de loko por bredi salikokojn estas tre grava, ĉar ĝi ne nur influas la produktokvanton kaj kvaliton de salikokoj, sed ankaŭ koncernas la investon kaj produktokoston. Konstruado de tiaj basenoj el malprofundaĵo postulas malmultan investon kaj ebligas utiligi tajdon por ŝanĝi akvon. Mi kliniĝis al baseno kaj vidis sennombrajn salikoketojn naĝantaj. En ondetanta baseno moviĝis boato kun salikoka nutraĵo. Bredisto disŝutis nutraĵon per ŝovelilo. Salikoketoj alrapidis al la flosanta nutraĵo kaj iuj el ili eĉ elsaltis el la akvo. La nutraĵo estas diversa. Ili ŝatas manĝi malgrandajn konkulojn, algojn, fiŝetojn,

sojfaban kaj arakidan rekrementon. Iu bredisto diris al mi, ke salikokoj facile multiĝas. Unu salikokino unufoje povas ellasi 300 000-1 200 000 ovojn. Iuj eĉ plurfoje ellasas ovojn. La kreska periodo de salikokoj daŭras de julio ĝis oktobro.

Sur revenvojo de Jimo al la urbo mi rigardis tri-tavolan bredojn.

La tri-tavola bredado signifas, ke oni kulturas laminaron en la supratavola akvo kaj bredas platajn konkulojn aŭ mitulojn en la meztavola akvo kaj holoturiojn kaj angilojn sur la fundo. Tia bredado ne nur plene utiligas la akvon, akcelas kreskadon de algoj, konkuloj kaj fiŝoj kaj altigas la produktokvanton, sed ankaŭ utilas al la ekvilibro de mara ekologio.

Marakva bredado estas malmulte kosta kaj donas tujan efikon. Laŭdire, la marakva bredado en aliaj marbordaj regionoj de Ĉinio kiel en Qingdao jam fariĝis modelo de la ekonomia disvolviĝo kaj atingis certan skalon. La produktokvanto de marakva bredado en multaj marbordaj gubernioj kaj urboj jam superis tiun de fiŝado en proksima maro.

## DE KRUDA ĜIS FAJNA PRILABORADO

Ĉe la bordo de la Flava Maro staras vicoj da modernaj fabrikdomoj. Navetas aŭtoj kaj ŝipoj. Regas plena vicleco. Ĝuste tie estas la Prilaborejo de Akvoproduktaĵoj sub la Qingdao-a Marfiŝa Kompanio.


Ĝia respondeculo Song Yisheng diris al mi, ke la prilaborejo havas historion de 70 jaroj kaj en la jaroj de reformado ĝi ŝanĝis sian produktan manieron nur fiŝi kaj vendi freŝajn fiŝojn kaj komencis fajnan prilaboradon de marproduktaĵoj.

Tiutage mi rigardis produktaĵon de bongustaj rostitaj fiŝpecoj, kiuj trovas debiton en- kaj eksterlande. En la pecigejo iu laboristino diris al mi, ke la materialo ĉefe estas navodoj (*Navoda septentrionalis*). Antaŭ kelkaj jaroj navodoj



vendiĝis ofte en Pekino, sed ili malofte vidiĝis en la lastaj jaroj. Laŭdire bongustaj fiŝpecoj fajne prilaboritaj estas tre ŝatataj de klientoj. Multaj manĝaj-fabrikoj produktas rostitajn fiŝpecojn, tial oni malofte vidas navodojn en la bazaroj.

La prilaborejo nun produktas fiŝajn varojn de pli ol 50 specoj fajne prilaboritajn, kiaj fiŝpulvoro, fiŝepata oleo, ladfiŝoj, fiŝkolbasoj. El ili la blanka fiŝepata oleo kaj ladpneŭmatoforo (*Pneumatophorus japonicus*) kun tomata saŭco gajnis ŝtatan arĝentan premion kaj ministerian bonkvalitan premion, havas grandan debiton tra la tuta lando kaj vendiĝas en sudorienta Azio, Afriko, Oceanio, Eŭropo, Hongkongo kaj Aŭmen. ■



En la prilaborejo de akvoproduktaĵoj

## KORESPONDI DEZIRAS

\* Mi planas eldoni lernolibron pri fiziko por studentoj kaj serĉas kunlaborantojn tutmonde. Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien, Aŭstrio.

“Sukero, Nutrado, kario”: Nemalhavebla por via saneco!

Prezo 1,80 gld. (+sendokosto). Libroservo de UEA.

\* Alagoana Asocio de Esperanto, caixa postal 796, 57.001, Maceio/AL, Brazilo bonvenigas ĉinajn esperantaĵojn (afiŝojn, fotojn, salutkartojn), cele al granda ekspozicio en januaro/90. Dankon ni sendos per urbaj pk. Kaj niaj lernantoj dez. kor. tm. pri ĉt.

\* S-ro Zhang Xiaojun, 28-j., dez. kor. kun geamikoj el Hong Kong, Hindio, Japanio kaj okcidentaj landoj pri diversaj temoj kaj interŝ. pm. bk, afrankitajn bildkartojn, pm-blokojn, unuataĝajn kovertojn kaj kolektas kalendarojn, bild-gazetojn, E-insignojn, artaĵojn. Adr.: 23 Huang Pu Lu, Wuhan 430010, Hubei, Ĉinio.

\* S-ro Wei Yanjun, 28-j., dez. kor. tm. pri ĉt. angle, Esperante, france, ruse, ĉine, japane, kaj interesiĝas pri muziko, literaturo, geofiziko kaj kolektas pm. bk, unuataĝajn

kovertojn, filatelaĵojn pri Esperanto. Adr.: 23 Huang Pu Lu, Wuhan 430010, Hubei, Ĉinio.

\* Aleksandro Batarŝin proponas amikan korespondadon kaj interŝ. neuzitajn pm. Adr.: K. Marks 74 kv 24, 685030 Magadano, USSR.

\* Balazs Anna-Maria, 29-j. profesorino, dez. kor. pri ĉt. precipe pri Ĉinio, Japanio, kaj kutimoj de indianoj el Ameriko. Adr.: Str. Uliului nr. 1, 3400 Cluj-Napoca, Rumanio.

\* S-ro Andrzej Gielert, 40-j., dez. kor. tm., interesiĝas pri muziko, sporto, turismo, historio, geografio, religio, kaj politiko, kaj interŝ. pm. kaj bk. Adr.: PL-10-684 Olsztyn, ul. Murzynowskiego-22/27, Pollando.

\* Piotr Litwicki, 18-j., dez. kor. tm. pri ĉt. precipe pri filozofio, muziko kaj literaturo. Adr.: ul. Monivszki 3/12, PL 67-200 Glogow, Pollando.

\* Ĵivile Jonuŝevičiute, 19-j., dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: J. Janonio 8-22, Palanga 235720, Litovio, USSR.

\* Jukitoŝi Satoo, 41-j. dez. kor. tm. pri ĉt., interesiĝas pri diversaj lingvoj. Adr.: Išii 1229-1 Išii-ĉoo, Mjoozai-gun, Tokuŝima-ken, 779-32 Japanio.

\* Klaus-Dieter Scholz, 30-j., dez. kor. tm. Esperante, angle, germane kaj indonezie. Adr.: PSF 2078, Erfurt, DDR-5060.

\* Szasz Tibor, 27-j., dez. kor. pri Wushu, Ĉigong, ĉinaj tradiciaj artoj kaj aliaj temoj. Adr.: C.P. 15-11, 3400 Cluj-Napoca, Jud. Cluj, Rumanio.

\* Fakuloj por pervarmeca metalprilaborado el ĉiuj landoj estas serĉataj por interŝanĝo de spertoj kaj terminara kunlaboro. Peter Hauser, Karlsbader Str.OLA, 9435 Erla, GDR.

\* Herbert und Gudrun Feid, 63-j. pensiulo, dez. kor. kun ĉinaj samidean(in)oj, interesiĝas pri la vivo, laboro kaj kulturo de ĉino. Adr.: Postschliessfach 48, Hildburghausen, DDR 6110.

\* S-ro Dieter Rooke dez. kor. tm. Adr.: Aussere Klus 11, CH-4702 Oensingen, Svislando.

\* Henrika Marcinkenaite, 13-j. lernantino, dez. kor. tm. kolektas bildkartojn, glumarkojn, poŝtmarkojn, kalendarojn ktp. Adr.: Str. Paber zYes 30-21, 232010 Vilnius, Litovio, USSR.

\* Torsten Buhning, 22-j. studento pri kemio, dez. kor. pri diversaj temoj precipe pri arto kaj botaniko. Adr.: Grosse Schaftrift 116, Dessau, 4502 GDR.

# Vojaĝo en suda Henan (II)

## FABRIKO DE POLIAMIDAJ TEKSAĴOJ

La 2-an de junio ni venis en fabrikon de poliamidaj teksaĵoj en la urbo Pingdingshan.

Tie ni vidis, ke la fabriksdomoj estas interligitaj per dikaj tuboj. Ĉirkaŭ la fabriko kaj ambaŭflanke de pura vojo kreskas arboj, floroj kaj herboj. Tio ŝajne montras, ke la fabriko estas bone administrata.

La pli-ol-40-jara parolema vicfabrikestro Li akceptis nin. Li diris al ni, ke la unuaperioda konstruo de la fabriko kompletigis en decembro 1981 kaj la duaperioda kompletigis kaj ekfunkciis en aŭgusto 1987. Nun la fabriko havas 5 200 laboristojn kaj produktas 28 000 tunojn da poliamidaj teksaĵoj ĉiujare.

Li diris ankaŭ, ke la fabriko estas unu el la tri plej grandaj samspecaj fabrikoj en la mondo kaj kerna entrepreno de la ĉina kaŭĉukpneŭmatika industrio. Post la fondiĝo de la fabriko finiĝis la historio, ke Ĉinio faras pneŭmatikajn teksaĵojn el kotono.

Ni ekkonis, ke pneŭmatiko el poliamida teksaĵo ne nur multe pli reduktas la produktokoston ol tiu el kotono, sed ankaŭ duoble longigas la uzadon. Samtempe ĝi levas sian reproduktan kapablon de 2-3 al 4-5 fojoj.

Pri la reguligo nun farata en la ekonomia kampo de Ĉinio s-ro Li malkaŝe diris, ke ĉar en la ĉina ekonomia vivo troviĝas iuj konfuzoj, la fabriko alfrontas malfaci-

lojn: nesufiĉeco de materialo kaj energio, tro rapida altiĝo de produktokosto kaj manko de cirkulanta kapitalo. Tial li tre aprobis, ke la ĉina registaro senŝanceliĝe faras ordigon kaj reguligon en la ekonomia kampo, por ke la ekonomia vivo estu pli orda.

Kiam unu el ni demandis, kian rimedon ili aplikis, por ke la fabriko daŭre disvolviĝu sub la malfavora situacio, s-ro Li fidoplene respondis, ke la fabriko jam decidis praktiki la politikon "fari multspecajn produktaĵojn kun unu kiel la ĉefa". Ili intencis per tio vigligi la entreprenadon por venki la malfacilojn. Nun ili sin preparas por starigi farejon de tapiŝo-fadenoj kun jara produktokvanto de 2 000 tunoj, prove produkti poliesteraĵajn fibrojn bezonatajn de industrio kaj kune kun la Chengdu-a Scienc-teknika Universitato disvolvi produktadon de nilona inĝenieria plasto. Se la lasta afero estos sukcesa, tute ŝanĝiĝos la situacio, ke la krudmaterialoj de la fabriko venas ĉefe el aliaj landoj kaj aliaj provincoj.

## NANYANG ABUNDA JE HISTORIAJ RESTAĴOJ

La 5-an de junio ni forlasis la urbon Pingdingshan kaj veturis al Nanyang en la sudokcidenta parto de Henan. Ankaŭ Nanyang estas antikva urbo fama kiel Xuchang (Ŝjuĉang), sed ilia diferenco estas, ke Nanyang havas pli multajn historiajn restaĵojn ol Xuchang.

Ni venis unue en la Shanxi-

Shaanxi-an Gildejon en Sheqi(-Ŝeĉji)-gubernio de Nanyang. Ĝi estas granda eleganta konstruaĵaro de Qing-dinastio (1644-1911) starigita en 1755. Ĝi havas tri kortojn kaj konsistas el granda halo, flankaj haloj, longaj koridoroj en oriento kaj okcidento, turo-forma scenejo, sonoril-tambura turo, fera flagstango kaj glazurita muro. Ĝiaj dispozicio kaj strukturo estas raciaj kaj originalaj. La gubernia dokumento notis, ke la gildejo estis konstruita per mono de komercistoj ofte trapasantaj Sheqi-gubernion. Tie ili traktis pri negoĉo kaj ripozis.

La oficejo de Neixiang-gubernia registaro estas alia fame konata historia restaĵo en Nanyang. Ĝi estas plej bone konservita el la samspecaj oficejoj en Ĉinio. Laŭ la loka historia dokumento, la oficejo de Neixiang-gubernia registaro konstruiĝis en Yuan-dinastio (1279-1368). Ĝi estis rekonstruita en 1892. Nun ĝi havas 117 ĉambrojn el brikoj kaj ligno, frontajn kaj internajn pordojn, unuan, duan kaj trian halojn, arsenalon, impostejon, florkulturejojn en oriento kaj okcidento kaj multajn flankajn domojn. La unua kaj dua haloj aspektas kiel antaŭe. Meze de la unua halo, malantaŭ la tablo pendas la kolora bildo "Marakvo kaj Matena Suno", sur la tablo estas papero, tuĉo, peniko kaj tuĉfroto, sigelvakso kaj tubo por ordonosignoj kaj ambaŭflanke de la halo viciĝas torturiloj. Irinte en la halon, ni tuj sentis seriozecon.

Krome, en Nanyang troviĝas ankaŭ la Templo de Eminentaj Dok-



toro konstruita en 1656 memore al fama kuracisto Zhang Zhongjing (Ĝang Ĝongĝing) de la Orienta Han-dinastio (25-220), la Templo Wuhou konstruita en 1308 memore al Zhuge Liang (Ĝuge Ljang), ĉefministro en la periodo de Tri Regnoj (220-280), kaj la tombo de sciencisto Zhang Heng (Ĝang Heng) de Han-dinastio.

Laŭ propono de la gastiganto ni veturis al la Nanyang-a Eksponejo de Han-dinastiaj Pentraĵoj situanta en antaŭurbo. La eksponejo estis konstruita en 1958. Tie konserviĝas ŝtonaj gravuraĵoj faritaj en 206 a.K.— 220 p.K.

La plank-areo de la eksponejo estas 2 300 m<sup>2</sup>. Nun en la eksponejo konserviĝas 2 000 Han-dinastiaj ŝtonplatoj kun gravuritaj bildoj. Ĉar plejparto de ili estas 1-2 metrojn alta, ili devas okupi grandan spacon por montrado, tial nur pli ol 200 el ili estas ekponataj. Tiuj bildoj gravuritaj sur ŝtonplatoj montras al la modernaj homoj la kreivon kaj imagipovon de homoj antaŭ preskaŭ du mil jaroj kaj ankaŭ iom konigas la vivon en tiu tempo. Plejparto de tiuj vivecaj bildoj riĉaj je troigo en kruda stilo prezentas legendojn kaj historiajn epizodojn kaj iuj aliaj montras turisman karavanon, bankedon, viziton, muzikilludon, dancon kaj akrobataĵon. Administranto de la eksponejo diris al ni, ke ĉiuj ŝtonplatoj konservataj en la eksponejo estas elterigitaj en Nanyang. En tiu regiono restas tiel multaj ŝtonplatoj kun gravuritaj bildoj de Han-

dinastio ĉefe pro tio, ke en Han-dinastio Nanyang jam estis sufiĉe prospera urbo. Kaj tiutempa moro de luksa entombigo puŝis aristokratojn kaj riĉajn komercistojn ornamati sian estontan tombon per tiaj ŝtonplatoj por pavado.

## PRODUKTEJO DE AKTINIDIOJ (Actinidia chinensis)

Xixia (Ŝjiŝja)-gubernio situas en montregiono 150 km. okcidente de Nanyang. Ĝi estas unu el la limregionaj gubernioj de Henan kaj la lasta etapo de nia vojaĝo.

Posttagmeze de la 7-a de junio, tuj kiam ni eniris en montregionon en okcidento, ni sentis, ke la temperaturo malaltiĝis kaj malaperis tia varmego, kian ni spertis en aliaj lokoj de Henan. Dum la vojo ni ĝuis verdajn montojn kaj arbojn kaj lirlantajn riveretojn.

La Xixia-a Instituto pri Aktinidiodoj ja estas konstruita sur tia bela kaj kvietanta monto. Zhu Hongyun (Ĝu Hongjun), prezidanto de la instituto, tre ĝojis pro nia vizito. Li diplomiĝis el forstokultura instituto antaŭlonge kaj laboris jam pli ol 20 jarojn en la instituto pri aktinidiodoj.

La 50-jara Zhu diris al ni, ke en la baseno de Yangzi-rivero kaj en pli ol 10 provincoj en suda Ĉinio troviĝas sovaĝaj aktinidiarboj, sed Xixia estas plej riĉa je tiaj arboj. Post esplorado la instituto konsta-

tis, ke en Xixia troviĝas 800 hektaroj da sovaĝaj aktinidiarboj kreskantaj kaj velkantaj escepte de regionoj ekspluatitaj kaj ekspluatataj.

En la montrejo de la instituto ni vidis specimenojn de aktinidiodoj en centoj da vitraj ujoj. S-ro Zhu diris, ke en 1976 ili komencis esplori kulturadon de sovaĝaj aktinidiarboj. Nun ili elkulturis 9 bonajn speciojn kaj popularigis ilin en la tuta lando. Kulturado de tiaj sovaĝaj fruktarboj ja estas iniciatita de ili.

Ni informiĝis de li, ke Nov-Zelando konata kiel amasproduktanto kaj prilaboranto de aktinidiodoj enkondukis ĉinajn aktinidiarbojn en 1904 kaj post bredado en dekoj da jaroj fine faris aktinidiodojn unu el la raraj kaj valoraj fruktospecoj en la mondo.


“Tamen ĉinaj aktinidiodoj jam aperis en la internacia merkato,” fiere diris s-ro Zhu, kiu dediĉis 10 jarojn al kulturado de aktinidiodoj. “En Xixia-gubernio estas fabriko, kiu produktas aktinidiodojn, faras el ili marmeladon, sukron, ladmanĝaĵon kaj eksportas ilin al FR Germanio, Japanio, Malajzio, Singapuro, Hongkong kaj Aomen.”

En la eksperimentejo de la instituto ni vidis verdajn aktinidiarbojn sane kreskantaj kaj grandajn kaj malgrandajn verdajn fruktojn sur ili. S-ro Zhu diris al ni, ke aktinidiodoj maturiĝos septembre kaj tiam ili fariĝos ore flavaj kaj aromaj. ■

En laborejo de poliamidaj teksaĵoj por pneŭmatiko en Pingdingshan



La Shanxi-Shaanxi-a Gildejo



# Edziĝo de Ximen Qing pro doto Diboĉado de Ying Bojue pro ĝojo

(la 16-a ĉapitro)

**F**ORLASINTE la bordelon, Ximen Qing rajdis al la hejmo de Li Ping'er situanta en la strato Leono. Lin sekvis servoknabo Dai'an. Ili haltis antaŭ la pordo kaj vidis ĝin fermita. Ximen Qing el tio certiĝis, ke liaj edzinoj jam iris hejmen. Li lasis Dai'an frapi je la pordo, por ke la servistino onjo Feng malfermu ĝin. Enpaŝinte, li trovis, ke la salono estas hele lumigita de kandeloj, kaj Li Ping'er, en eleganta funebra vesto, estas ĝuanta melonsemojn, apogante sin al fenestro. Vidinte Ximen Qing, ŝi tuj iris renkonte al li per graciaj paŝoj kaj diris kun rideto:

"Se vi venus iom pli frue, vi renkontus ĉi tie viajn trian kaj kvinan\* damojn. Ili foriris antaŭ nelonge. Via ĉefdamo\*\* foriris pli frue. Ŝi diris, ke vi forestas de la hejmo. Kie vi estis ĵus antaŭe?"

"Matene mi kaj miaj amikoj iris rigardi lanternojn kaj preterpasis vian domon. Poste mi renkontis aliajn du amikojn, kaj ili tiris min al bordelo kaj tie mi restis ĝis nun. Mi timis, ke vi malpacientiĝos de atendo kaj forŝteliĝis, pretekstante iri al necesejo. Se ne tiel, mi ne sukcesus liberigi min eĉ nun."

"Multajn dankojn pro via kara donaco. Viaj damoj ĵaluzis pri tempo kaj foriris frue. Kiel enua mi estis!"

Ĉe tio Li Ping'er replenigis la tablon per apetitaj pladoj kaj vino, lumigis ĉiujn kandelojn kaj malvolvis vatan pordkurtenon. Lignokarbo arde brulis en fajrujo, spirala ambra incenso dissendis bonodoron. Li Ping'er proponis al Ximen Qing vinon kaj surgenuiĝis kun peto:

"Mia edzo\*\*\* jam forpasis. Nun

mi havas neniun parencon. Per tiu taso da vino mi petas vian helpon. Ne abomenu min pro mia malbela. Mi voluntas esti via ĉambristino kaj fratino de viaj damoj. Mi voluntas eĉ morti pro via afableco. Kiel vi pensas?" Ĉe la diro larmoj elverŝiĝis sur ŝia vizaĝo.

Transprenante el ŝia mano la tason, Ximen Qing diris kun rideto: "Bonvolu leviĝi! Mi gravuros vian amon en mian koron. Estu trankvila! Post la funebro por via edzo, mi bone aranĝos la aferon. Hodiaŭ estas ĝojiga tago por vi. Ni drinku." Eltrinkinte la tason, li plenigis ĝin kaj proponis al ŝi. Li Ping'er sidigis lin sur la honoran lokon. Servistino onjo Feng okupiĝis pri preparado de pladoj en la kuirejo. Post nelonge ŝi prezentis al ili vermicelojn.

"Kiu hodiaŭ kantis por vi?" Ximen Qing demandis al li Ping'er.

"Hodiaŭ kantis Dong Jiao'er kaj Han Jinchuan. Ĉe la vespero ili akompanis viajn trian kaj kvinan damojn hejmeniri," respondis Li Ping'er.

Ximen Qing sidigis maldekstre. Ili tostis unu por la alia, dum ĉambristinoj Yingchun kaj Xiuchun servis apude.

Eniris Dai'an. Li genuiĝis kaj riverencis kapaltere al Li Ping'er. Ŝi tuj stariĝis kaj salutis lin. Ŝi ordonis Yingchun transdiri al onjo Feng, ke tiu lasta donu al Dai'an manĝaĵojn kaj vinon.

"Iru hejmen post la manĝo!" Ximen Qing diris al Dai'an.

"Ne malkaŝu hejme, ke via sinjoro estas ĉi tie!" Li Ping'er atentigis.

"Tion mi scias. Mi diros, ke la mastro tranoktos en bordelo kaj mi iros revenigi la mastron morgaŭ matene," Dai'an diris.

Ximen Qing kapjesis. Li Ping'er tre ĝojigis kaj laŭdis lin:

"Kiel sprita knabo, eĉ liaj okuloj povas paroli!"

Ŝi tuj ordonis Yingchun doni al li kvinonon de taelo da argento, por ke li aĉetu konfitaĵon en festotagoj. Krome ŝi promesis al Dai'an:

"Morgaŭ donu al mi la mezuron de viaj ŝuoj, kaj mi faros por vi paron da bonaj ŝuoj."

Dai'an tuj genuiĝis kaj diris kapfrapante sur la teron:

"Ne, mi ne rajtas havi tiun honoron."

Poste li eliris, prenis manĝon kaj foriris kun la ĉevalo. Onjo Feng fermis kaj riglis la pordon.

Li Ping'er kaj Ximen Qing distris sin per enigmo-solvo. Post drinkado ili elprenis 32-pecan eburan domenkubaron, sternis sur tablo skarlatan tukon kaj ekludis drinkante. Post kelka tempo ili ordonis Yingchun bruligi kandelojn en la dormoĉambro. Mortis Hua Zixu kaj liaj servistinoj Yingchun kaj Xiuchun jam estis transprenitaj de Ximen Qing, tial Ximen Qing ne evitis ilin dum sia adultado kun Li Ping'er. Yingchun pretigis por ili la liton kaj prezentis drinkaĵon. Sur la lito ŝirmita per kolvualo, Li Ping'er nudigis sian ĉarman torson, kaj Ximen Qing sidis kun ŝi ŝultro ĉe ŝultro, ludis dome non drinkante el granda pokalo.

"Kiam vi konstruos por mi domon?" Li Ping'er demandis al Ximen



Qing.

“Tio komenciĝos en februaro. Interligiĝos mia domo kun la via kaj unuiĝos niaj ĝardenoj. En la antaŭa korto mi konstruos domon kun senfista tegmento kaj promenejo, kaj ankaŭ triĉambran pavilonon.”

“En teokestoj malantaŭ mia lito mi konservas 40 ĝinojn (2 ĝinoj = 1 kg.) da kalambaka ligno, 200 ĝinojn da vakso, du vazojn da hidrargo kaj 80 ĝinojn da pipro. Morgaŭ vi prenu ilin kaj vendu kontraŭ mono por via domkonstruado. Se vi ne rigardas min turpa, persvadu vian ĉefdamon, ke mi estu ŝia fratino. Neniom mi zorgos, kioma damo via mi estos. Ho mia koro, mi ne povas disiĝi de vi.” Je tio ŝi larmis.

Ximen Qing tuj forviŝis al ŝi larminojn kaj konsolis ŝin:

“Mi vidas vian koron. Sed mi povos preni vin nur post la paso de la funebro kaj finiĝo de la domkonstruado. Alie vi ne havos loĝejon.”

“Se vi vere volas edziĝi al mi, bonvolu konstrui mian domon tuj apud tiu de la kvina damo; mi ŝategas ŝin. Ŝi estas tre bona. Via tria damo Meng Yulou estas tre afabla al mi, kaj ili ambaŭ estas tre similaj unu al la alia, kvazaŭ naskitaj de la sama patrino. Sed via ĉefdamo ja havas temperamenton kaj en ŝiaj okuloj mi vidas malŝaton.”

“Sed fakte tiu mia damo Wu estas tre tolerema; alie, kiel ŝi povus toleri tiom da virinoj? Poste mi konstruos por vi po tri ĉambrojn en la du kortoj kaj instalos du trairejojn. Ĉu vi kontentiĝos?”

“Mia fraĵo, mi estos tre kontenta.”

Ambaŭ kuŝiĝis, ekscese amoradis unu la alian kaj ĝuis volupton ĝis la dua horo. Post tio ili dormis brakumante unu la alian kaj en la tagmezo ili ankoraŭ restis en la lito.

La virino, antaŭ ol sin kombi, transprenis de Yingchun kaĉon, manĝis duonbovlon da kaĉo kaj ambaŭ ekdrinkis denove.

Tiam Dai'an frapis je la pordo. Li rajdis ĉi tien por venigi Ximen Qing hejmen. Ximen Qing demandis al li, kiu staras ekster la fenestro.

“Venis tri klientoj kaj ili havas multe da fajnaj drogoj kaj ofertas al



Ximen Qing kaj Li Ping'er

la Dua Onklo Fu. Ili postulas nur 100 taelojn da argento kiel ekpago, kaj la ceteran sumon ili pagigos meze de aŭgusto. Nun ĉefdamo ordonis min venigi vin hejmen por decidi tion,” respondis Dai'an.

“Ĉu vi ne malkaŝis, ke mi estas ĉi tie?” Ximen Qing demandis.

“Ne. Mi diris, ke vi estas ĉe onjo Li Gui.”

“Kiel malsprita! Ja estas sufiĉe, ke onklo Fu akceptu ilin. Kial vi venas ĝeni min?”

“Onklo Fu pretas agi, sed la klientoj ne konsentis kaj persistas, ke vi iru subskribi kontrakton,” Dai'an ekskuzis sin.

“Dai'an ja venas por revenigi vin. Vi do iru! Negoco estas la plej grava. Ĉu ĉefdamo ne ofendiĝos, se vi ne reiros hejmen?” Li Ping'er diris al Ximen Qing.

“Vi ne komprenas la ruzaĵon de tiuj barbaroj: Nun depresio regas sur la merkato, kaj iliaj varoj ne estas bonvenaj, tial ili volentas pagigi post duonjaro aŭ tri monatoj, alie ili agus certe arogante. En nia gubernio mia butikoj estas la plej granda kaj la stoko abundega. Ilin mi ne timas. Ili certe venos peti min iom poste.”

“Komercistoj ne devas ofendi klientojn. Laŭ mia opinio, vi bonvo-

lu iri kontaktiĝi kun ili. Ni havos multajn tagojn en la estonteco por nia ĝuado,” tiel admonis Li Ping'er.

Ximen Qing akceptis ŝian konsilon, lante levigis, kombis la harojn, lavis al si la vizaĝon, surmetis vestojn. Li Ping'er preparis por li manĝon.

Ximen Qing rajdis hejmen. Tie lin atendis 4-5 klientoj por subskribi kontrakton kaj pesi la varojn.

Post foriro de la klientoj Ximen Qing paŝis en la ĉambron de Pan Jinlian.

“Kie vi estis hieraŭ? Diru la veron, alie mi informos ĉiujn pri via fifaro,” diris Pan Jinlian.

“Kiam vi drinkis en la hejmo de Hua, ni, reveninte de la lanterna festivalo, drinkis en la bordelo kaj trankotis tie. Hodiaŭ mi revenis nur post kiam mi vidis Dai'an,” Ximen Qing respondis trompe.

“Mi scias, ke Dai'an iris revenigi vin, sed fakte eĉ via spirito ne iris tien! Fi, vi maldankemulo, vi mensogas al mi! Hieraŭ nokte, kiam ni revenis de tiu malĉastulino, ŝi ŝtele vokis vin al si kaj diboĉis kun vi la tutan nokton kaj nur post tio ŝi forpermesis vin. Dai'an, perfekta fripono, rafinita peco, diris al la ĉefdamo tiel, sed al mi tute malsame. Kiam li revenis kun la ĉevalo, la

ĉefdamo demandis lin: ‘Kial via sinjoro ne revenis? Ĉe kiu li drinkis?’ Li respondis: ‘Reveninte de la lanterna festivalo, li kaj la dua onklo Ying drinkis ĉe onjo Li Gui, kaj li ordonis min revenigi lin morgaŭ matene.’ Sed kiam mi demandis lin, li nur ridetis anstataŭ respondi. Sub mia insista demandado li malkaŝis: ‘La mastro drinkas ĉe sinjorino de Hua.’ Vere saĝa diablo! Kiel li scias, ke ni samopinias? Certe vi instruis al li la respondon.”

“Ne, mi ne instruis al li,” Ximen Qing mensogis unue, sed antaŭ Pan Jinlian li nenion povis kaŝi kaj diris detale al ŝi:

“Li Ping’er invitis min al drinko kaj informis min pri via gastado. Ŝi plendis kun larmoj en la okuloj, ke ŝi estas soleca kaj sentas timon en nokto, ke duono de la domo estas vaka. Ŝi urĝis min edziĝi al ŝi kaj demandis, kiam mi komencos konstrui por ŝi domon. Ŝi havas abundan stokon en valoro de centoj da taeloj da arĝento. Ŝi petis min vendi por ŝi la stokon kaj konservi por ŝi la monon, ke mi uzu ĝin por la domkonstruo. Ŝi urĝis konstrui la domon, por ke ŝi povu kunvivi kun vi kiel fratino. Sed ŝi timas, ke vi rifuzos.”

“Mi ne abomenas ŝin. Mi esperas, ke ŝi vivos kune kun mi. Ankaŭ mi sentas solecon kaj bezonas ŝian akompanion. Haveno neniam ŝtopiĝas de la ŝipoj kaj vojon ne obstrukcos ĉaroj. Se mi ne tolerus ŝin, kiel mi povus esti tolerata de la ĉefdamo? Mi ne estas impertinenta. Mi nur timas, ke aliaj ne estas tiel afablaj kiel mi. Bonvolu informi pri la opinio de la ĉefdamo!”

“Vi diris prave, sed ŝi ankoraŭ portas la funebro,” Ximen Qing diris kontente.

Iun tagon poste Ximen Qing kontaktiĝis kun makleristo kaj vendis la stokon de Li Ping’er kontraŭ 380 taeloj da arĝento. Li Ping’er akceptis nur 180 taelojn kaj la ceteran sumon ŝi komisiis al Ximen Qing, por ke li konstruu por ŝi la domon per tiu sumo.

La konstruado komenciĝis en la oka tago de la dua monato laŭ la luna kalendaro, difinita de aŭguristo. Ximen Qing komisiis 500 taelojn da arĝento al la ĉefservisto Lai Zhao kaj la intendanto Ben la Kvara,



Ximen Qing kaj liaj amikoj

por ke ili zorgu pri la materialoj kaj komando de la laboruloj. Ben la Kvara nomiĝis Ben Dichuan. Li estis juna, bela kaj tre kapabla. Antaŭe li estis servoknabo en hejmo de supera eŭnuko, sed li ne bone laboris sur sia posteno kaj estis elpelita. Unue li dungigis al riĉulo kiel servisto, sed forlogis mamnutristinon kaj prenis ŝin kiel sian edzinon. Nun li estis makleristo de butikoj de malnovaj vestoj. Li povis ludi multajn muzikilojn. Lin tre ŝatis Ximen Qing pro lia talento kaj favoris lin per maklerado pri drogherboj de sia butikoj. En decido de multaj aferoj gravaj kaj bagatelaj li fariĝis nemankigebla. Tiu-tage, sub la komando de Ben Dichuan kaj Lai Zhao, la laboruloj malkonstruis la malnovan domon de Li Ping’er, detruis la muron de la korto, metis la bazojn por nova domo, turo kaj aliaj konstruaĵoj...

La tagoj flugis rapide kiel sago. Ximen Qing prizorgadis hejme la konstruadon jam pli ol unu monaton. Iun tagon en la unua tagdeko de la tria monato, nome cent tagojn post la morto de Hua Zixu, Li Ping’er interkonsiliĝis kun Ximen Qing, ke ŝi volas fini la funebro per forbruligo de la ligna tabulo kun la nomo de Hua:

“Mi vendos mian domon, por ke vi ne postenu gardiston. Edziĝu al mi kiel eble plej baldaŭ. Mi sentas timon en tiu vaka hantata domo. Diru

al la ĉefdamo, ke ŝi savu min. Mi volantas esti via kromedzino zorganta viajn litaĵojn kaj neniam plendos.” Ĉe la diro ektorentis larmoj sur ŝia vizaĝo.

“Ne ĉagreniĝu. Antaŭ kelke da tagoj mi jam diris al mia edzino kaj Pan Jinlian. Ne malpacienca! Certe mi edziĝos al vi post la finkonstruo de la domo kaj paso de la funebro por via edzo,” Ximen Qing konsolis ŝin.

“Bone! Se vi estas sincera, urĝu la domkonstruadon. Mi volontus morti, se mi povus vivi en via domo eĉ nur unu tagon. Savu min el enueco. Unu tago nun longas por mi kiel tuta jaro.”

“Mi memoras vian peton,” diris Ximen Qing.

“Aŭ alie, post la finkonstruo kaj paso de la funebro, mi loĝu kune kun via kvina damo. Diru tion al ŝi! Mi atendas vian respondon. Baldaŭ estos la finiĝo de la funebro kaj mi devos aranĝi ceremonion por fini la funebro.”

Ximen Qing promesis kaj tranoktis ĉe ŝi. En la sekvanta tago li interkonsiliĝis kun Pan Jinlian. Ŝi diris: “Bone! Mi tre volantas disponigi al ŝi du ĉambrojn, sed skrupulon mi havas. Vi devas konsiliĝi ankoraŭ kun la ĉefdamo. Mi estos neniom ĝenata; ŝipo neniom damaĝas la riveron. Ĉio dependas de la ĉefdamo.”



Ximen Qing venis en la ĉambro de sia unua edzino Wu Yueniang, kiu estis kombanta al si la harojn. Ximen Qing informis ŝin pri la deziro de Li Ping'er, sed ŝi diris malkonsilante:

"Ne decas, ke vi edziĝos al ŝi: Unue, ne pasis la funebro por ŝia edzo. Due, vi estis amiko de ŝia edzo. Trie, vi havas rilatojn kun ŝi kaj ŝi vendis al vi la domon kaj deponis ĉe vi multe da objektoj. Infamio cirkulas rapide kiel naveto. Oni diris al mi, ke Hua Da, ŝia bofrato, estas fripono. Se li aŭdos pri la afero, li certe ĝenos nin per malagrablaĵo. Mi tion diris nur por protekti vin, kaj la decidon vi mem faru."

Ŝia parolo mutigis Ximen Qing. Li paŝis en la salonon, meditis sur seĝo. Li ne sciis, kiel respondi al Li Ping'er, sed tamen li ne povis ne respondi al ŝi. Post longa meditado li venis al Pan Jinlian.

"Kion diris al vi la ĉefdamo?" demandis Pan Jinlian.

Ximen Qing ripetis la diron de Wu. "La unua fratino malaprobas, sed ŝi diris prave: vi estis bona amiko de Hua, vi aĉetis lian domon kaj plue edzinigis lian edzinon al si, sed mi havas alian penson: Vi ja estis amikoj kaj vi povas tiel agi," diris Pan Jinlian.

"Sed mi havas la skrupulon, ke Hua Da malhelpas pretekstante, ke ne pasis la funebro. Kiel mi povus refuti lin? Kaj kiel mi respondus al Li Ping'er?"

"Fi, neniom embarasa. Diru, kiam vi iros respondi al ŝi? Hodiaŭ aŭ morgaŭ?"

"Ŝi volas, ke mi respondu hodiaŭ."

"Diru al si: 'Mi jam interkonsiliĝis kun via kvina fratino, sed en ŝia ĉambro stokiĝis abundo da drogoj. Se vi transloĝiĝus tuj, la drogoj perdus tenejon. Bonvolu atendi ankoraŭ kelkajn tagojn. Via domo estos baldaŭ finkonstruita. Mi urĝos ilin al dekoracio de la domo, kaj tiam ankaŭ la funebro pasos. Ĉu ne estus pli dece, ke tiam mi edziĝos al vi? Ĉu tia arango ne estos pli deca?' Vi diru senhezite."

Ximen Qing tre ĝojiĝis de ŝia konsilo kaj senprokraste iris al Li Ping'er.

"Kio rezultis el via interkonsili-

ĝo?" demandis Li Ping'er.

"Via kvina fratino diris, ke ne estos malfrue, se vi transloĝiĝos post kompleta dekorado de la nova domo. Nun en ŝia ĉambro la lokon okupas amasoj da objektoj. Do kie konservu viajn objektojn nun? Kaj cetere, mi timas, ke Hua Da, la unua frato de via edzo, malhelpas pretekstante, ke ne pasos la funebro."

"Li ne kuraĝas interveni en mian aferon. Mi vivas de mia propra kaso. Ni jam interkonsentis antaŭ la tribunalo kaj dividis la havaĵojn. Kaj cetere, mian unuan edziniĝon decidis miaj gepatroj, sed la duan edziniĝon mi mem decidis. De antikve herediĝas la kutimo, ke viro ne intervenas en la aferojn de bofratino. Nun mi vivas malfacile, sed li neniom helpas min. Se li kuraĝos plendi kontraŭ mi, li mortos sidante, se mi ne lasos lin kuŝanta. Trankviliĝu via moŝto. Li ne kuraĝas ofendi min." Kaj fine ŝi demandis: "Kiam finiĝos la konstruado de mia domo?"

"Mi jam ordonis, ke ili unue pretigu por vi la triĉambro domon kaj la lakado plenumiĝu en majo," diris Ximen Qing.

"Fraĉjo, mia kara, urĝu. Mi atendas la tagon!"

Tiam servistino prezentis al ili vinon, kaj ili denove drinkis kaj amradis nokte. De tiam Ximen Qing venis al ŝi post ĉiu tria aŭ kvina tago.

Tempo pasis rapide, kaj la domkonstruado daŭris jam du monatojn. La dekorado de la triĉambro domo estis baldaŭ finota, kaj sola laboro nefinita estis tegmentado de la fronta domo. Venis la festo Kvina de la Kvina Monato. La pordoj de ĉiuj domoj estis ornamitaj per artemiziaj folioj kaj amuleta papero. Li Ping'er pretigis festenon kaj invitis Ximen Qing al si por interkonsiliĝi pri la dato de geedziĝo. Ili decidis okazigi rekviemon kaj samtempe geedziĝon en la 15-a de la monato.

"Ĉu vi invitos Hua Da kaj aliajn fratojn de Hua Zixu al la rekviema ceremonio?" Ximen Qing demandis.

"Mi sendos al ili ĉiujn invitilon. Ili mem faru decidon."

Poste, en la difinita tago, Li Ping'er petis 12 bonzojn de Bao'en-templo plenumi la ceremonion hejme.

En tiu tago, Ximen Qing sendis donaci trionon de taelo da arĝento al Ying Bojue por la datreveno de lia naskiĝo. En la mateno li donis al Dai'an kvin taelojn de arĝento, por ke li pretigu festenon ĉe Li Ping'er en la vespero por fini la funebro. Iom post tagmezo li rajdis al Ying Bojue kunportante servoknabojn Ping'an kaj Huatong.

Por la festeno Ximen Qing alvokis du aktorojn. Unu el ili estis konata, nomata Wu Hui, frato de Wu Yin, kaj la alian Ximen Qing ne konis.

"Mi estas frato de Zheng Aixiang. Mi nomiĝas Zheng Feng." Genuiĝis kaj sin prezentis tiu nekonata.

Ximen Qing sidis sur la honora loko kaj donacis al ili po kvinonon da taelo de arĝento. Ĉe la sunsubiro venis Dai'an kun ĉevalo.

"La damo petas vin iri al ŝi pli frue," li iris al la tablo kaj flustris al Ximen Qing.

Ximen Qing okulsignis al li kaj li estis preta foriri. Sed Ying Bojue haltigis lin kaj insultis:

"Vi hundaĉo, konfesu. Se ne, mi fortordos viajn orelojn. Kiom da naskiĝdatoj mi havas en unu jaro? Vi volas revenigi vian sinjoron tiel frue, do kien? Kiu alsendis vin? Ĉu la ĉefdamo, aŭ Li Gui? Se vi kaŝos, mi ne lasos vian sinjoron fianĉigi vin hundidon, eĉ post cent jaroj."

"Fakte, neniun alsendis min. Mi venas atendi la mastron nur en la konsidero, ke baldaŭ malheliĝos, kaj eble la mastro volas reiri hejmen," persistis Dai'an.

Nenio rezultis el la pridemando, kaj Ying Bojue nur povis lasi la aferon:

"Se morgaŭ mi informiĝos pri la vero, mi kalkulos kun vi!"

Poste li donis al Dai'an pokalon da vino kaj duonteleron da kukoj.

Post longa tempo Ximen Qing iris al tualetejo por ŝanĝi veston kaj lin sekvis Dai'an.

"Kiuj hodiaŭ gastis en la hejmo de Hua?" Ximen Qing demandis ie en kvieta loko.

"Hua San iris en la kamparon. Hua Si ne venis pro okulmalsano. Hodiaŭ venis nur geedzoj Hua Da. Ili manĝis la tutan tagon. La viro foriris sola, kaj lia edzino restis plu

kelkajn horojn. Ĉe la foriro la sinjorino vokis ŝin en sian ĉambron kaj donacis al ŝi dek taelojn da arĝento kaj du kompletojn da vestoj. Ŝi genuiĝis kaj kapofrapis surtere por danko.

“Kion ili diris?”

“Neniom ili ĉikanis. Ili nur volas viziti vin, post kiam ŝi edziniĝos al vi.”

“Ĉu vere?”

“Ĉu mi kuraĝus trompi vin?”

Ximen Qing multe ĝojiĝis de la informo, kaj demandis plu:

“Ĉu finiĝis la rekviemo?”

“Antaŭ longe foriris la bonzoj kaj la nomtabulo estas jam forbruligita. La sinjorino volas, ke vi iru al ŝi pli frue.”

“Jes, pretigu la ĉevalon.”

Kiam Dai'an estis ekironta, lin surprizis Ying Bojue per subita krio. Ying subaŭskultis en koridoro.

“Fi, vi hundaĉo. Vi sekretas kontraŭ mi, tamen mi aŭdis. Vi ambaŭ brile komplotas.” Ying Bojue insultis Dai'an.

“Hundaĉo, ne tiel laŭte,” diris Ximen Qing.

“Se vi petos min, mi silentos,” diris Ying Bojue.

Ili revenis al la tablo kaj informis la festenantojn pri la baldaŭa geedziĝo de Ximen Qing kaj Li Ping'er. Ĉiuj ŝajnis sin koleraj kaj riproĉis:

“Fraĉjo, kia amiko vi estas! Kial vi ne sciigis nin pri la feliĉa afero? Aŭ se Hua Da malhelpos, ni tuj iros persvadi lin, nur se vi bezonos. Se li kuraĝos malobei, ni tordos al li la brakojn. Sed efektive ni ne scias, ĉu certa estas la geedziĝo. Bonvolu sciigi nin! Kial oni bezonas amikojn? Se vi bezonas nin, ni volontas pasi tra fajro por vi. Ni ne povus naskiĝi en la sama momento, tamen ni deziras morti en la sama tago. Kiel sinceraj ni estas por vi, sed vi ankoraŭ sekretas al ni.

“Fraĉjo, se vi ne malsekretigos al ni, morgaŭ mi diskonigos al franjoj Li Gui kaj Wu Yin; sed tiam ni ĉiuj sentos honton,” Xie Xida aldonis.

“Do mi diru al vi la veron, la afero jam estis decidita,” Ximen Qing diris kun rideto.

“Ĉu la dato estis difinita?” deman-

dis Ying Bojue.

“Kiam vi edziĝos, ni iros gratuli vin. Vi alvoku almenaŭ kvar aktorojn kaj ni ĝuu festenon,” diris Xie Xida.

“Tio estas certa. Certe mi invitos vin ĉiujn,” Ximen Qing diris.

“Estus pli bone hodiaŭ tosti por la fraĉjo ol morgaŭ gratuli,” diris Zhu Rinian.

Kaj Ying Bojue tenis la tason, Xie Xida la vinkruĉon, Zhu Rinian la pladon, dum la ceteraj genuiĝis akompane Ximen Qing. Ankaŭ la du aktoretoj genuiĝis kaj kantis “Feliĉan Tagon”. Ili trinkigis al Ximen Qing 3-4 tasojn da vino.

“Fraĉjo, en la nupta tago, ĉe la festeno, Zheng Feng kaj Wu Hui estos nemankigeblaj,” Zhu Rinian diris. “Ni certe servos tiun tagon,” daŭrigis Zheng Feng.

Post tosto ĉiuj sidigis. li drinkis ankoraŭ kelkan tempon ĝis malheliĝo. Ximen Qing malpacientiĝis kaj ekstaris por foriri. Ying Bojue ankoraŭ volis reteni lin, sed Xie Xida konsilis:

“Frato Ying, forpermesu lin. Ne malfruigu lin, alie la bofratino kulpiĝos lin.”

Liberigite, Ximen Qing tuj forrajdis kaj venis al la strato Leono. Li Ping'er en ĉarma vesto atendis lin. La salono estis brile prilumata de kandeloj, kaj la tablo estis plenkovrita de abundo da pladoj. Ĉe la tablo estis nur unu seĝo. Ŝi sidigis Ximen Qing kaj malŝtopis vinvazon. Servistino tenis la vazon, dum Li Ping'er prezentis al li plenan tason da vino. Ŝi surgenuiĝis kaj kvarfoje adorkliniĝis.

“Hodiaŭ la nomtabulo de mia edzo estis jam forbruligita. Feliĉe, via moŝto ne rifuzis min, kaj mi povos servi ĉe vi kaj kunvivi kun vi,” diris Li Ping'er.

Ximen Qing leviĝis kaj prezentis al ŝi tason da vino.

“Kion la geedzoj Hua Da diris hodiaŭ?” demandis Ximen Qing.

“Post tagmanĝo mi vokis ilin en mian dormoĉambron kaj informis ilin pri nia geedziĝo. Hua Da senĉese jesis kaj eĉ diris, ke post nelonge li lasos sian edzinon gastu ĉe ni. Mi donacis al ili dek taelojn da arĝento

kaj du kompletojn da vestoj. Ili tre kontentiĝis kaj foje-foje diris dankon ĉe la adiaŭo.”

“Se tiel, mi lasos ilin gastu ĉe mi. Sed mi neniel indulgos lin, se li grumblos eĉ unu vorton.”

“Ankaŭ mi ne permesos lian intervenon.”

Ĉe tio maljuna servistino prezentis al ili supon kaj pladojn. Li Ping'er propramane faris por li delikatajn ĝiaŭzi-ojn farĉitajn el muelita ŝafaĵo. Servistino Xiuchun du-foje verŝis sudan vinon en arĝente damaskenitajn tasojn. Ximen Qing trinkis duonon kaj la restan prezentis al Li Ping'er. Ili eltrinkis plurajn tasojn. Li Ping'er ege ĝojiĝis pro la proksimiĝo de la edziniĝo.

“Kiam vi estis drinkanta ĉe Ying, mi jam longan tempon atendis. Mi timis, ke vi ebriiĝos, kaj sendis Dai'an venigi vin ĉi tien pli frue. Ĉu ili rimarkis?” Kun plena rido sur la vizaĝo, Li Ping'er diris al Ximen Qing.

“Ying divenis la aferon kaj devigis la knabon konfesi. La fratoj petolis je mi. Ili venos gratuli min kaj antaŭsciigis min, ke en la nupto devos kanti aktoroj. Ili trinkigis al mi plurajn tasojn da vino. Mi kaptis ŝancon por eliri, sed ili volis reteni min. Kaj nur dank' al petado ili liberigis min.”

“Ili forpermesis vin, tio pruvis, ke ili estas sobraj en ŝercado,” Li Ping'er diris.

Li Ping'er foliĝis pro ebriiĝo kaj rigardis al Ximen Qing per lascivaj okuloj. Ximen Qing ne povis reteni sin de volupto. Ambaŭ preme kisis kaj kisadis unu la alian.

“Ho, mia koro, se vi vere volas edziĝi al mi, plej baldaŭ! Via veno ne estas oportuna kaj ne lasu min en longa enuiga sopirado,” Li Ping'er brakumis Ximen Qing kaj petegis kun korverŝo.

Ambaŭ kuŝiĝis, turniĝadis kaj ekĝuis amoradon. ■

\* La tria damo de Ximen Qing estas Meng Yulou, kaj la kvina estas Pan Jinlian, kiu murdis sian edzon Wu Da en komploto kun Ximen Qing.

\*\* La ĉefdamo de Ximen Qing estas Wu Yueniang.

\*\*\* Ŝia edzo Hua Zixu estis amiko de Ximen Qing.



# La Infana Mondo en Tianjin ĉe Bohai-mararo

Teksto kaj fotoj de LI CHUNGENG

**H**AIHE-rivero, trafluante la movoplenan urbon Tianjin (Tjanĝin) kaj ĝian kvietan antaŭurbon, enfluas en vastan Bohai-maron. Mi sekvis la riveron ĝis la maro. Subite antaŭ miaj okuloj aperis konstruaĵoj en diversaj formoj kaj stiloj. Mi pensis, ke mi vidis miraĝon, kaj tre ĝojis pro tio. Proksimiĝinte al la konstruaĵoj mi eksciis, ke ili estas la Infana Mondo de Song Qingling\* en Tianjin ĉe Bohai-mararo.

La enirejo de la infana mondo nomiĝas kosma pordo, en formo de duonsuno kaj duonluno ĉirkaŭantaj la terglobon. Ili simbolas la teron, ĉielon kaj homaron. Enirinte, mi promenis inter la konstruaĵoj similaj al miraĝo. Tie troviĝas konstruaĵoj kun pinta kaj duonsfera tegmentoj, blanka etaĝdomo en la tibeta stilo, bambua domo de taj-oj kaj konstruaĵoj de mjaŭ-oj, koreoj kaj gaŭŝan-oj. Ĉiu havas originalan stilon, kvazaŭ okazus arkitektura ekspozicio. Poste mi informiĝis de administranto de la infana mondo, ke dum la projektado de la infana mondo oni ja konsideris karakterojn de la infanoj. Oni starigis tiujn konstruaĵojn por kontentigi la scivolemon de la infanoj, doni al ili pli multe da scioj kaj konigi al ili la arkitekturon de diversaj ĉinaj naciecoj kaj tiun en aliaj mondpartoj.

La infana mondo estas abunda je interesaj instalaĵoj. Plejparto de ili lokiĝas en la Domo de Saĝo, kiu

kovras areon de 1 800 m<sup>2</sup>. Tie estas eksponejo de kara patrujo, kun granda kvanto da bildoj kaj specimenoj de bestoj, vegetaĵoj kaj mineraloj. Tie la infanoj povas koni la naturon, geografion, brilajn historion kaj kulturon kaj interesajn morojn kaj kutimojn. Vizitinte la eksponejon, ili povas veturi en la "submaran mondon" per submarŝipo. La "submara mondo" plenas de groteskaj rifoĵoj kaj diversaj markreskaĵoj, kaj la blua kamplumo aldonas al la "submara mondo" ian misteron. Estante tie, oni sentas sin kvazaŭ sur la marfundo.

Reveninte el la "submara mondo", mi rigardis en la direkto de gajaj ridoj kaj vidis multajn grandajn ludmaŝinojn apud insuleto el artefaritaj koraloj, kie amaso da infanoj ludas plezure. Iuj el ili kondukas karambolajn aŭtojn kaj aliaj sidas sur "turneblaj abeloj" senĉese levataj kaj mallevataj de granda maŝino. En la amuzejo de la infana mondo oni instalas diversajn amuzilojn. Krome, tie troviĝas ankaŭ elektronaj ludmaŝinoj ŝatataj de grandaj infanoj kaj pilkoj kaj salta instalaĵo en "kastelo" taŭgaj por malgrandaj infanoj.

La administranto diris al mi, ke antaŭe tie estis multaj grandaj entreprenoj kaj multaj loĝantoj, tamen troviĝis neniu amuzejo por infanoj. En 1984 oni decidis konstrui tie infanan mondon. La proksimaj grandaj entreprenoj kaj div-

ersaj soci-tavoloj aprobis tion kaj malavare donacis monon por la konstruado. La 1-an de junio 1988 la infana mondo komencis akcepti malgrandajn vizitantojn. La proksimaj infanoj fine havas sian propran amuzejon.

La infana mondo ne nur akceptis unuopajn infanojn, sed ankaŭ organizis someran kampadon. Tie troviĝas tri-etaĝa infana loĝejo, kie povas loĝi 100 personoj. Ĉiu ĉambro havas ĝenerale 4 litojn. La infanoj, kiuj partoprenis en la somera kampado, venis el Tianjin. Ili estas junaj. Por bone prizorgi ilin, la infana mondo permesis al multaj patrinoj partopreni en la somera kampado. La aktivadoj de la somera kampado ne limiĝis en la infana mondo, la infanoj ankaŭ veturis per ŝipo al maro por rigardi marondojn kaj akiri pli da kuraĝo, vizitis Bohai-olekampon por koni la procezojn de naftokolektado kaj petrolorafinado kaj Dagu-fuorton por koni la historion, kiel la ĉina popolo rezistis kontraŭ fremdlandaj invadantoj. La tri-taga vivo en la somera kampado estas neforgebla por la infanoj. Ĉe la fino de la kampado ili ne volis disiĝi. Adiaŭante la infanan mondon, ankaŭ mi pretervole turnis la kapon por ririgardi tiun lokon plenan de naiveco kaj rido. ■

\*Song Qingling estis la honora prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko.



Parto de la infana mondo



Parto de la infana mondo






Sur turnebla ludmaŝino



En naĝejo ĉe maro



Saltado en "kastelo"



● En la 40 jaroj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko la meznombra enspezo de la urbanoj 11-oble kreskis. Kun dekalkulo de tio kaŭzita de prezaltiĝo, la meznombra enspezo de la urbanoj antaŭ 1978 kreskis je 1.7% ĉiujare kaj en 1978-1988 je 7% ĉiujare.

● En 1952-1988 la ĉinaj kamparanoj liveris al la ŝtato sume 2 153 milionojn da tunoj da greno kaj 80.62 milionojn da tunoj da koton. Kun malpli ol 7% de la agraro de la mondo, la ĉinaj kamparanoj fundamente solvis la problemon de minimuma vivnivelo por la kvarono de la monda loĝantaro.

● Post sia fondiĝo, en la 40 jaroj, la nova Ĉinio produktis sume 5 milionojn da aŭtoj. Formiĝas en Ĉinio kompleta aŭto-industria sistemo.

● En Ĉinio nun troviĝas pli ol 440 urboj, el kiuj 300 estas fonditaj en la 40 jaroj post la fondiĝo de la popola respubliko. Inter la urboj 28 havas po pli ol milionon da loĝantoj, 30 po 500 000-1 000 000 loĝantojn kaj 110 po 200 000-500 000 loĝantojn.

● La unua klimatizita duetaĝa turisma trajno de Ĉinio ekfunkciis antaŭ nelonge. Ĝi konsistas el 10 vagonoj kun ordinaraj sidlokoj kaj unu vagono kun remburitaj sidlo-



Klimatizita du-etaĝa turisma trajno

koj. La vagonaro povas enteni 1 970 personojn.

● Ĝis la fino de la lasta julio, en la 10-jara praktiko de la reformo kaj pordmalferma politiko, Ĉinio fondis ĉ. 20 000 entreprenojn investitajn de alilandaj komercistoj. Ili investis 13.6 miliardojn da usonaj dolaroj.

● La 64 000-tonela lozkarga ŝipo "Gloro Ĉinio" ekfunkciis antaŭ nelonge en la Jiangnan-a Ŝipfarejo de Ŝanhajo. Ĝi estas konstruita por Usono. Laŭ raporto, la ŝipfarejo konstruos ankaŭ por Usono, FR Germanio, Hongkong k.a. 5 samspecajn ŝipojn.

● Aŭguste de la kuranta jaro, la Pekina Observatorio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj trovis gravan sunrandan eksplodon. Fakuloj diris, ke la aktivado de la suno eble produktos intensan geofizikan efekton, kaŭzos ĝenadon de jonosfero kaj eksplodon de teromagnetismo.


● La unua "provtuba" bovido de Ĉinio naskiĝis la lastan aŭguston en la eksperimenta esplorcetro de la Universitato de Interna Mongolio. Ĝi estas virseksa kaj pezas 30 kg.

● Lastatempe oni elfosis el tombo de la Orienta Han-dinastio

La unua ĉina provtuba bovido



Manekenoj





(25-220) en Shandong-provinco raran bildoŝtonon, sur kiu gravuriĝas paro da ĝejnuloj kisantaj sin reciproke kaj la alia homo, kiu rigardas ilin. Fakuloj opinias, ke tre malofte vidiĝas tia bildoŝtono de la feŭda Orienta Han-dinastio.

● En la speciala ekonomia regiono Shenzher de Guangdong-provinco oni konstruis miniaturan pitoreskejon, kiu estas la plej enhavoriĉa kaj plej granda en la mondo. En ĝi estas la mondfamaj Granda Muro, terakotaj militistoj kaj ĉevaloj de la maŭzoleo de Qin-dinastio, Imperiestra Palaco, Taishan-monto, Tri Gorgoj de Yangzi-rivero, Okcidenta Lago de

Hangzhou k.a., sume ĉ. cent vidindejoj, kiuj prezentas la stilojn kaj artan valoron de la vidindejoj. Ĝi estas miniaturo de la naturaj pejzaĝoj kaj historiaj vidindaĵoj de Ĉinio.

● La Unua Pekina Vesta Festivalo okazis en la unua tagdeko de septembro. En ĝi ĉ. mil specoj da varoj, inkluzive de 680 000 vestoj, ornamaĵoj kaj kosmetikaĵoj, estis eksponataj kaj vendataj al klientoj. Dum la festivalo la ĉina vestomontro trupo faris prezentadon.

● La 5-an de septembro Cho Hoon Hyun de Sud-Koreio venkis Nie Weiping en la kvina partio de

la finalo de la Ying-pokala vejĉiludo kaj gajnis la ĉampionecon kaj premion de 400 000 usonaj dolaroj. Nie estas la subĉampiono.

● Televido, ankoraŭ fremda por plejparto da ĉinoj antaŭ dek jaroj, nun jam eniris multajn familiojn. Laŭ statistiko, en Ĉinio televido, kun 600 milionoj da rigardantoj, jam fariĝis nemankigebla en la ĉina socia kultura vivo.

● En 1988 Ĉinio malkovris entute 283 narkotaĵ-negocajn kazojn, konfiskis 246 kg. da opio, 169 kg. da heroino kaj kaptis 203 krimulojn.

## POR KOMENCANTOJ

# Tragedio el dorlotado

Estis frato kaj fratino. La fratino estis pli aĝa ol la frato je dek jaroj. Iliaj gepatroj forpasis antaŭ longa tempo, kaj la fratino vivtenis sin kaj la fraton per sia malalta salajro.

Ĉiumatene la fratino bicikle portis la fraton al la lernejo kaj vespere reportis lin hejmen. La lernejo estis en kontraŭa direkto de ŝia oficejo. Iom kreskinte la frato veturis al la lernejo per aŭtobuso, kaj ŝi devis porti lin ĝis la haltejo kaj eĉ en aŭtobuson, kaj vespere ŝi devis atendi lin ĉe la haltejo por konduki lin trans la straton. Foje la lernejo aranĝis ekskurson por la lernantoj. La fratino neniel povis resti trankvila kaj petis unutagan forpermeson por iri kune kun la frato. Ŝi sekvis la fraton paŝon post paŝo. Hejme la frato nenion bezonis

fari krom legi libron kaj fari hejmtaskon, ĉar ŝi nenion lasis la fraton fari.

Nur unu fojon li vizitis bazon. Estis dimanĉo. La fratino estis okupita de purigado, lavado kaj kuirado. La frato iris sola al la bazaro. Li trarigardis la bazon kaj iris hejmen kun informo pri la specoj kaj prezoj de legomoj. Kiam la fratino diris al li, kion li devas aĉeti, li duafoje venis al la bazaro. Sed tiam malkaŝis la prezoj de la legomoj, kaj li ne povis decidi, ĉu li devas aĉeti aŭ ne. Do li denove iris hejmen por konsulti la fratino.

Ŝia salajro apenaŭ povis kovri la pagon por la vivtenado de la familio kaj lia lernado. En mezlernejo la frato devis lerni fremdan lingvon, kaj la fratino aĉetis


por li magnetofonon. Sed li ne sciis kiel uzi ĝin kaj la fratino devis ŝalti por li la aparaton, enmeti kaseton kaj premi klavon...

Poste la frato eklernis en universitato en alia urbo. Ŝi akompanis lin ĝis la lernejo kaj foriris post zorgema aranĝo de liaj litaĵoj.

Iun tagon la fratino estis mirigita de subita reveno de la frato. Li larme diris al ŝi: "Franjo, mi ne volas lerni plu, mi volas ĉiam resti ĉe vi, dum la tuta vivo!"

Fine la fratino komprenis, ke en la universitato la frato ne sciis lavi vestojn, nek ordigi la litaĵojn, kaj en la manĝejo li eĉ ne sciis kiel pagi por sia manĝo. ■






Mi Xiong

# Juna Pentristo Mi Xiong

de SHI SIWEI



La batika pendbildo "Tri Budaoj"



La batika pendbildo "Bovoj"







La olepentraĵo sur ŝĵuan-papero "Budaista Dancado kaj Kantado" (parto)

Mi Xiong, 25-jara pentristo de Ŝanhajo, estas konata pro siaj pentraĵoj pri budaoj kaj pri rakontoj el budaismaj sutroj. Li faris du longajn vojaĝojn por esplori la naskiĝlokojn de la antikva ĉina budaisma arto, postlasante siajn piedsignojn en famaj budaismaj temploj, ŝtonkavernoj kaj ĉe surrokaj gravuraĵoj en la provincoj Henan, Sichuan, Gansu kaj Qinghai kaj la Tibeta Aŭtonoma Regiono. La mirindaj atingoj de la antikva ĉina budaisma arto nutras lian verkadon. "Arto prezentas belon, budaismo alvokas bonon, kaj la antikva budaisma arto celas al vero. Hodiaŭ oni kombinas budaismajn pensojn kun nuntempa ideologio, studas kaj evoluigas la riĉan trezoron de la antikva budaisma arto.

Jen unuigas la vero, bono kaj belo," li diris.

Mi Xiong sin okupas ĉefe pri ole-pentraĵo sur *ŝĵuan*-papero (papero produktita en Xuancheng de Ĉinio) kaj batike farita ŝtofo. La ole-pentraĵo estas nova speco de la ĉina arto evoluinta en la lastaj jaroj. Li unue desegnas per tuĉolinioj sur *ŝĵuan*-papero, poste li aldonas akvigitan farbon kaj fine li pentras per olea farbo. Por la pentraĵo "Budaista Dancado kaj Kantado" 6 metrojn longa kaj 1.2 metrojn larĝa, Mi Xiong dediĉis preskaŭ duonjaron. Ĝin li finis post 5-foja reverkado. Per 20 homfiguroj dancantaj kaj kantantaj ĝi prezentas la entuziasman ludon de budaisma muziko. Uzante metodojn

de la eŭropa arto, li strebas al la belo de kreviĝo, kiu sugestas, ke ĝi postvivis atakojn de la naturo tra jarmiloj.

Batiko estas tradicia arto de la sudokcidenta Ĉinio. Oni unue faras bildon sur ŝtofo per vaks-truleto, poste metas la ŝtofon en tinkturan kuvon kaj fine akve lavas ĝin. La tuta procedo daŭras dek tagojn. La batika pendbildo "Tri Budaoj" per fluaj linioj bildigas budaan teneron kaj simpatian. La batikaj artaĵoj de Mi Xiong plejparte ĉerpas materialon el budaismaj rakontoj kaj havas profundan edifon pri vivo.

Liaj verkoj eksponiĝis en Japanio, Francio, Kanado kaj Usono. ■

# Ĉinio, tiele mi ekkonis vin!

de DANIEL GOES (Belgio)



La aŭtoro (maldekstre) kun ĉinaj geamikoj

**D**E la 1-a ĝis la 23-a de aprilo 1989 mi faris rondvojaĝon en Ĉinio. Per ĉi tiu mia rakonto, mi klopodas por montri la impreson kiun faris al mi tiu vojaĝo.

Mi ŝatas Ĉinion. Tiu majesta, impona kaj tiel fascina lando entenas la plej grandan popolon de la terglobo kaj tamen montras pli da respekto al la aparteco de minoritatoj ol landoj ekonomie pli riĉaj.

Dank' al la klarigo de nia tre kompetenta gvidistino, mi ekkomprenis nombron da apartecoj, kiuj estas tiom tipaj por Ĉinio. Tiel, nia gvidistino defendis arde la aranĝojn faritajn de la registaro rilate la naskiĝkontrolojn, kiujn mi, flandro, povis kompreni.

Tial mi kredas pri la politika sistemo de Ĉinio kaj mi plene fidis, ke la hodiaŭaj ĉinaj gvidantoj denove prenos la plej favorajn decidojn por la popolo, kiel en 1949, kiam Ĉinio, sub la gvidado de la amata gvidanto Mao Zedong, skizis la politikan linion por porti al la popolo la plej bonan bonfarton. Apartenas al la ĉina junularo, ĝia universala heredanto, la tasko ĝin preni kaj plue konstrui. La

ĉina junularo estas vere trapenetrata de la ideoj de la viro kiu savis la landon el ĥaoso kaj mizerero postmilitaj kaj samtempe zorgis ke ĉiu samlandano proporcie povu ĝui de la progreso. Nur registaraj gvidantoj kun percepto pri la estonto elektas bonfarton por ĉiuj anstataŭ bonfarton por kelkaj.

La komunismo estas vivanta politika sistemo. En 1945 ĝi estis la plej taŭga rimedo por savi Ĉinion. Por kuraĝaj, sinceraj politikistoj, ĉi tio estas defio provi iliajn politikajn sekvoliniojn en la rapida evoluo, kiun la mondo konas. Kio estas bona, ja ne timas komparon.

Konfido estas cetere treege pravigebla. La ĉarmaj, malgrandaj knabinoj, kiuj tiel gaje ridas, la fervoraj gelaboristoj, la tiom lertaj gemetiistoj kredigas nin je la estonteco. Estas plezuro vidi kiel precize kaj devokonscie la ĉinoj el jado, santalligno aŭ silko faras artajn objektojn kaj aliajn aĵojn. La prizorgita fina prilaborado atestas la amon kiun ĉi tiuj laboristoj havas je sia laboro.

“Farita en Ĉinio — Made in China” estas por mi garantietikedo. Mi ŝatas ĉi tiun popolon, pre-

cipe ĉi tiujn ridemajn, senprete tendajn personojn kun inteligenta rigardo. Vere ĉi tiu popolo estas favorata. Mi opinias ke por la troa nombro da ĉinoj mi trovas nur unu klarigon: “Ĉar Dio tiom amas la homojn, li donacis al la homaro grandiozan plimulton el tiuj amikaj, tiel fajne kulturitaj personoj.” Vere eksterordinara estas la eltrovemo per kiu la ĉinoj sur strato prezentas siajn varojn por ilin vendi, kiel la vendisto de batatoj aŭ la virineto kun sia glaciajveturileto.

Sur la kulinara tereno Ĉinio estas vera malkovro. La manĝo estis vera ravaĵo, arto, precipe kiam mi havis la honoron inviti manĝi ĉe ĉinoj hejme. Ĉi tiuj travivaĵoj perfektigis mian vojaĝon. Ĉiu ĉino aŭ ĉinino estas por mi frato aŭ fratino. La malgranda knabino, hejme laboregante, aspektis kiel mia propra filineto.

Dum mi sidas ĉi tie skribante, mi rigardas tra la fenestro kaj vidas la sunon. Mi ridetas ĉe la penso, ke tiu varma suno estas samtempe la fidela suno, kiu ĵus antaŭe kaj baldaŭ denove brilos super Ĉinio. Ju pli bone mi konas la ĉinojn, des pli multe mi ŝatas Ĉinion.

Mi esperas iam reveni. ■



# Idoj de Raraj Bestoj kaj Birdoj


Teksto kaj fotoj de LIU SIGONG

Kiam mi aŭdis, ke raraj nordorientaj tigroj, elafuroj (*Elaphrus davidionus*), nigrakolaj gruoj, blankaj gruoj kaj flav-abdomenaj tragopanoj (*Tragopan caboti*), bredataj en la Pekina Zoo, havas jam siajn idojn, naskiĝis en mi tuj la intenco ilin rigardi. Iutage de la lasta septembro mi havis la okazon viziti la nomitan zoon kaj vidis tiujn amindajn idojn, same kiel aliaj vizitantoj.

Xiao Yang (Ŝjaŭ Jang), laborantino de la zoo, akompanis min en la vizito kaj faris klarigon. Ŝi diris, ke la unua duonjaro de 1989, raraj bestoj kaj birdoj de 47 specoj de la zoo naskis 340 idojn. Xiao Yang daŭrigis: “Hieraŭ nokte naskiĝis unu ido en la zebrejo. Ni iru ĝin rigardi.”

Kvankam zebroj ofte vidiĝas en sia hejmloko Afriko, tamen ne estas facile bredi kaj reprodukti ilin trans la maro. Mi sekvis ŝin en la

Zebroj en la Pekina Zoo




Kontrolo de spermatozooj de nigrakola gruo

zebrejon, en kiu svarmis vizitantoj. Mi vidis, ke zebrido kuras tien kaj reen. En ĝoja ridado de la vizitantoj, ĝi subite haltis kaj revenis al sia patrino. La lasta lekis la zebriidon, frapante ĝian korpon per la

vosto, kvazaŭ dirante: “Petoluleto!”

En la Leon-tigra Monteto tri nove naskitaj nordorientaj tigroj (tiuspecaj tigroj vivas nur en nordorienta Ĉinio) jen saltadis surloke, jen postkuris unu alian. Mordante la vostojn reciproke, ili rondkuris surloke, kvazaŭ petolemaj infanoj. Kiam bredisto Lao Zhang (Laŭ Ĝang) kondukis nin en la bredejon, ili tuj kuregis al li, stariĝis sur siaj malantaŭaj kruroj, ĉirkaŭprenis liajn femurojn per la antaŭaj kaj milde mordis lian vestorandon, skuetante ĝin tien kaj reen. Mi tuj levis mian fotografilon kaj fotis la spektaklon. Lao Zhang diris al mi: “Ili naskiĝis antaŭ tri monatoj kaj baldaŭ foriros de mi. Verdire, mi ne volus adiaŭi ilin.” Xiao Yang diris: “Majstro Zhang bredis tigrojn jam pli ol 30 jarojn. Sub lia zorgema bredado naskiĝis pli ol 80 tigridoj.”



La Pekina Zoo kovras 86 hektarojn. Ĝi estas unu el la plej grandaj zooj en Ĉinio. En ĝi vivas 7 430 bestoj kaj birdoj de 612 specoj. En 1954, la zoo komencis esploran laboron pri bredo kaj reproduktado de bestoj kaj birdoj, por ke ili sane kresku kaj nasku idojn sub la kondiĉo de bredado. Zoologoj ellaboris sciencajn receptojn laŭ iliaj aĝo, sanstato, apetito kaj karaktero. Oni fiksdite nutras leonojn, tigrojn, leopardojn kaj aliajn bestojn per vivaj kokoj kaj kunikloj, por ke ili ne ŝanĝu sian sovaĝecon. Dank' al multjara esploro kaj praktiko, la zoologoj bone konas vivkutimojn kaj leĝojn de reproduktado de multaj bestoj, kio garantias la sanan kreskon kaj reproduktadon de la bestoj.


En la komenca tempo de la 50-aj jaroj la Pekina Zoo faris kampan esploradon al ruĝvertaj grupoj kaj samtempe detalan esploron pri la vivlokoj, kampaj vivmedioj kaj kutimoj de grandaj pandoj kaj nordorientaj tigroj, kio metis bazon por bone brede kaj reprodukti tiujn ĉi bestojn.

La Pekina Zoo portas sur si ankaŭ specialan esploron pri bredo kaj reproduktado de birdoj mina-





Blankaj grupoj reproduktitaj per artefarita fekundigo




Bredataj nordorientaj tigridoj

cataj de pereco, ekz-e, nigrakolaj grupoj kaj ruĝaj ibisoj. Nigrakola grupo estas la ununura altebena grupo inter la 15-specaj grupoj sur la tero. Ĝi generas sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo kaj travintras sur la Yunnan-Guizhou-a Altebenaĵo. Nun vivas nur pli ol 800 tiaj grupoj en la mondo. Tial ili

estas protektataj de la ŝtato kiel unuaklasaj birdoj. Por protekti kaj reprodukti tiuspecajn rarajn grupojn, la ŝtato plifortigis ankaŭ scienc-esploran laboron pri bredo kaj reproduktado, krom starigi rezervejon en la loĝejoj de nigrakolaj grupoj. En kvar jaroj la sciencistoj-teknikistoj de la zoo venkis multe

da malfaciloj. Dank' al tio, nigrakola grupo ellasis 7 ovojn per artefarita fekundigo. La ovojn kovis ruĝverta grupo anstataŭe. La kvar elkoviĝintaj gruidoĵ sane kreskas. Post tio, junio de la kuranta jaro la zoo atingis sukceson en reproduktado de blanka grupo en la sama maniero. ■

En bredejo de elafuroj



# Kiel naskiĝas la lingvoj

de JUAN RÉGULO PÉREZ (Hispanio)



La aŭtoro

**L**INGVOJ vivas, lingvoj mortas, sed kiel naskiĝas lingvoj? Kiam ni venas en la mondon, la lingvo ĉirkaŭvolvas nin nature, kaj ni ne pensas, ĉu temas pri io alia ol denaska komunikilo. Tiuj komunikiloj iam mortas, kiel la dalmato, kies lasta parolanto ĉesis vivi en 1898; aŭ mortadas, kiel la liva lingvo, kiun nuntempe parolas malpli ol cent homoj disigitaj de la mondmilito, parencaj al la estona kaj suoma popoloj, iam loĝantaj sur la marbordoj de Latvio;<sup>1</sup> aŭ, pli simple, temas pri stato, kiu troviĝas tie de nememorebla pratempo... Nu, jes ja, sed kiel, fakte, naskiĝas la lingvoj? Ĉar ĝis la dudeka jarcento troviĝas nenia spuro, nenia indikaĵo literatura pri tiu punkto. Eĉ Esperanto, kies historion ni pli-malpli konas, naskiĝis, kiel aŭtonoma lingvo, nur en la periodo inter 1908 kaj 1925, ĉar antaŭe

temis ne alie ol pri projekto. Tiel Esperanto povis ekformiĝi, ekfiksiĝi, elvolviĝi laŭ sia propra genio nur de kiam, en tiu tempo, eklingviĝis. Kaj nur de 1950 diversnaciaj gramatikistoj lanĉis ĝeneralan ofensivon kontraŭ la latindevenaj konceptoj, kiuj ĝis tiam regis kaj plagis nian Lingvon Internacian. “Ekspluatante”, diras Janton, “la potencialon entenatan en la *Fundamento*, la hodiaŭa uzo ne limiĝas je la Zamenhofa Esperanto. Sur la origina fundamento konstruiĝis novaj strukturoj, kiuj certe disfalus sen la firma Bulonja bazo, sed kiuj nete distingiĝas de ĝi. Kiel ĉiu alia lingvosistemo Esperanto funkcias nun memstare laŭ la propraj leĝoj kaj ne laŭ la decidoj de eksteraj instancoj. Zamenhof kreis projekton, sed la Esperantokomunumo faris ĝin lingvo. Tiu fenomeno estas unika en la tuta lingvohistorio”<sup>2</sup>. Sed ni lasu, por alia fojo, la demandon de la hindeŭropeco de Esperanto, ĉar ja se ĝia vortaro estas fakte hindeŭropa, tio neniel signifas ke la lingvostukturo sekvas la hindeŭropajn ŝablonojn; ktp. Ni do revenu al nia hodiaŭa problemo, nome: Kiel naskiĝas la lingvoj?

Kiam malsamaj lingvoj venas en kontakton kaj interkompreno fariĝas malfacila, el baraktado por sin reciproke rilati emerĝas interkomprenilo, kiun lingvistoj nomas piĝino. Piĝinoj — improvizitaj, porokazaj lingvoj — estas celkonforme funkciaj, sed per tio finiĝas ilia rolo, ĉar dank’ al tio, ke ili ne havas kongruajn regulojn, ili utilas nur por mallongaj renkontiĝoj, ne por plena, normala konversacio. Infanoj ŝajne konscias pri tio, diras

havaja lingvisto Prof. Derek Bickerton en sia libro *Roots of Language*,<sup>3</sup> ĉar en la havajaj plan-tejoj infanoj starigis kreolan lingvon nun tie funkciantan. La strukturo de la kreola lingvo de Havajio estas malsama ol tiu de la unuageneracia havaja piĝino, aŭ tiuj de la modernaj lingvoj tie ekzistantaj. “En Havajio”, opinias Bickerton, “ni havas empirian pruvon pri tio ke la unua kreola generacio kreis lingvon por kiu ne ekzistas ia evidentaĵo en la antaŭa generacio”.

En nia artikolo “Esperanto kaj Papiamento: la plej simplaj gramatikoj”, ni klopodis historii, kiel neceso pri reciproka kompreniĝo inter negraj sklavo-afrikaj, transportitaj en Amerikon el pluraj etnoj kun malsamaj lingvoj, kaj neceso pri interkompreniĝo kun iliaj mastroj, ĉefe portugaliaj negristoj, devigis tiujn krudajn analfabetajn primitivulojn starigi al si, post la piĝinoj de la transportistoj, novan, tre simplan lingvon. Tiu idiomo libere evoluis dum tri jarcentoj inter siaj agrafiaj parolantoj, ĝis kiam tiu interkomprenilo skribe ekfiksiĝadis komence de la 19-a jarcento. Hodiaŭ ĝi konsistigas kulturlingvon, nomatan papiamento, en kiu oni eldonas librojn, ĵurnalojn, revuojn kaj per kiu oni ludas teatraĵojn, dissendas radioinformojn, televidajn programojn ktp. La gramatiko de papiamento estas treege simpla, kaj en la citita artikolo ni donis plurajn klarigojn pri la strukturo de ĝia leksiko, pri ĝia lingvado ktp.

Nu, ĉar multaj nuntempaj lingvoj similas unu al alia same kiel similas kolibroj kaj goriloj. Se



oni volas spuri la evoluon de unuaj kaj de aliaj, oni sin trovas antaŭ grandaj baraĵoj: necesas trovi fosiliojn same de la bestoj kiel de la lingvoj. Por la bestoj Darvino trovis vivantajn fosiliojn sur Galapagoj, kaj tiel li povis starigi sian teorion pri la evoluado de la animalaj specioj, el praformoj, laŭ natura elekto kaj selekto. Sed ĉu por la lingvoj troviĝas analogaj fosilioj? Laŭ Bickerton, la kreolaj lingvoj estas la fosilioj de la lingvopaleontologoj, kaj sekve li asimilas la kreolajn lingvojn al la specioj, kiujn Darvino trovis sur Galapagoj.

Dum pli ol dek kvin jaroj Bickerton studis la kreolajn lingvojn de Gvajanio (aŭ Gujanio), de Havajio kaj de multaj aliaj landoj, kaj konstatis, ke ili ĉiuj havas similajn strukturojn — kio laŭŝajne sugestas, ke la homo posedas ian naturan, kunnaskan lingvan logikon, evidentigantan la ekziston de lingva “bioprogramo”, kiu muldas, reproduktas la kapablon, la talenton de la homoj por utiligi vortojn. Temas ja pri tre diskutata teorio, kiel asertas kaj mem firme diskutas Claude Hagège en sia libro *L'homme de paroles*. Sed Bickerton apogas sian teorion sur tiel ĝissufoke satiga kvanto da konvinkaj atestaĵoj, kiujn li kolektis dank’ al la studado de multaj malsamaj kreolaj lingvoj tra la tuta mondo, ke oni emas lin pravigi. Laŭ Bickerton, la kreolaj lingvoj nature elvolviĝas, ĉar iliaj strukturoj formiĝis el nenio, t.e. ne deiris de antaŭe ekzistantaj lingvoj. Li aldonas, ke la maniero kiel la infanoj lernas paroli pravigas la ideon pri tio, ke la kreolaj lingvoj reflektas lingvan bioprogramon. Tiuj observoj kondukis Bickerton aserti, ke la kreolaj lingvoj “irigas nin ĝis la bazaj pilieroj sur kiuj sidas nia humaneco”, en la kompreno, ke nur la lingvo distingas nin disde la bestoj, t.e. nin humanigas.

Same la havaja kreola lingvo, kiel la pli ol tricent kreolaj lingvoj de la mondo, dividas preskaŭ identajn sintaksajn kaj semantikajn strukturojn. Ekzemple ĉiuj kreolaj lingvoj posedas tri artikolojn,

nome difinitan, nedifinitan kaj nulan. Ili same posedas du ĝeneralajn tempojn: antaŭan kaj neantaŭan; du modojn: realan kaj nerealan. Cetere la kreolaj lingvoj disponas rimedojn por indiki la aspektojn, ĉu ago estas finita aŭ ne. Bickerton aldonas, ke tiuj kaj aliaj, ĝis naŭ, koincidoj konsistigas “pli ol sufiĉan pruvon, ke iaspeca genetica programtipo komuna al ĉiuj membroj de la specio estis decidige kunformiĝanta la kreadon de la kreolaj lingvoj”.

Kvankam Hagège forte kritikis la teorion pri la lingva bioprogramo, pri la lingvostruktura kunnaskismo, post kiam la kunnaskismaj teorioj de Chomsky kaj aliaj fariĝis misreputaciaj, nu, pri la fakto ke la kreolaj lingvoj reproduktas la manieron kiel formiĝis kaj evoluas la nunaj lingvoj, ambaŭ, Bickerton kaj Hagège, eĉ se nuancigite, koincidas en la fundamentaj ĝeneralajoj. Legu ĉe Hagège la ĉapitron “Le laboratoire créole”.

Meze inter unue la piĝinoj kaj poste la kreolaj lingvoj, Esperanto naskiĝis unue kiel kabineta artefakto, kiel lingva artefaritaĵo, kiu, de 1908 ĝis 1925, unue kun Zamenhof kiel ĉefgvidanto, poste dank’ al la kunlaborado de esperantistoj de multaj etnoj, pleje laŭ hind-eŭropaj ŝablonoj, ĉefe leksikaj, sed konservante sian eksterhind-eŭropan aglutinan karakteron. Ĉiam evoluante inter diverslingvaj **skribosciaj** uzantoj, la lingvo **nature** ekipiĝis per ĉiuj lingviloj de natura esprimmaniero, ĉefe dank’ al la dinamisma koliziado de siaj du plej karakterizaj tendencoj, nome: tiu, kiu postulas simplecon, eĉ se ĝi signifas malriĉecon, kaj tiu, kiu postulas riĉecon, eĉ se ĝi kunportas malsimplecon. Tiuj du ŝajne kontraŭdiraj sed vere komplementaj procesoj donis al Esperanto ĉi ties koheron, ĉi ties elanon, ĉi ties lingviĝon, kaj, sekve, ĝian aŭtentikan, legitiman, originalan literaturan kapablon.

La libroj de Bickerton kaj Hagège priskribis, kiel formiĝis kaj evoluas novaj lingvoj, laŭ procezoj sufiĉe similaj al tiuj, laŭ kiuj tre probable formiĝis la pralingvoj, el

kiuj devenas niaj nunaj idiomoj. Estas tre bele, kaj rivelacie, ke kompetentaj lingvistoj, kiaj Auld, Janton kaj aliaj, ekzemple okaze de la centjariĝo de Esperanto, aperigis lumajn studojn montrantajn, kiel Esperanto daŭre patentigas siajn latentajojn, t.e. per siaj propraj rimedoj pliriĉigas sian aŭtonomion, ekzemple en la lingva analizado, kie ĝiaj ensintagmaj kaj intersintagmaj reguloj montriĝis ja revoluciaj.

Esperanto nome havas la samajn tri artikolojn, kiujn posedas la kreolaj lingvoj, ĉar malgraŭ la fakto, ke la *Fundamento* diras “Artikolo nedifinita ne ekzistas”, jen en la sama *Fundamento* Zamenhof skribis “Unu vidvino havis du filinojn”, frazo en kiu **unu** rolas kiel nedifinita artikolo. Kelkfoje same rolas **iu**, **ia**, **certa**, **kelkaj** k.s. Malgraŭ la vualado kaj subtila analizado, kiujn prezentas *PAG* kaj *PIV* (eble pro la respekto al la *Fundamento*-dogmo koncerne la neekziston de nedifinita artikolo), el lingvistika vidpunkto Esperanto posedas difinartikolon, nedifinartikolon kaj nulartikolon, kiel la kreolaj lingvoj. — Esperanto posedas rimedojn por montri la aspektojn de daŭranta kaj finiĝinta agoj, same kiel la kreolaj lingvoj. — Esperanto ne ŝanĝas la vortordon por formi demandajn propoziciojn, dank’ al la partikulo **ĉu** kaj al la tabelvortoj, ĉar tiu sistemo estas pli facila, pli natura ol reordigi la propoziciojn, kaj simile la kreolaj lingvoj ne ŝanĝas la vortordon por demandi. — Kaj tiel plu. Necesus solida studado kaj komparado pri la maniero kiel en sia depiĉinado la kreolaj lingvoj kaj en sia lingviĝo la artefakto Esperanto trairis al aŭtonomaj, naturaj lingvoj, kun multaj koincidoj.

En ĉiu vivanta lingvo, en ĉiu lingvado formiĝas frazeologismoj, lingvofiksaĵoj, kiuj ne estas proprasence disanalizeblaj, nur bloke, monolite signifantaj. Ĉar Esperanto estas vivanta lingvo, ankaŭ ĝi posedas frazeologismojn, kliš-lingvaĵon nur historie-etimologie diserigeblajn, sed ordinare, normale sentatajn kiel idiotismojn es-

tigitajn de sia propra kulturo, do kun Esperanta spirito, kun Esperantosignifa kromenhavo, rolantaj en ordinara konversacio kaj en la literaturo, pri kiuj ni okupiĝis aliloke.<sup>4</sup> Tiun sortimenton de frazeologismoj kunformis, elfaris la internacia, tutmonda, tergloba fenomeno nomata Esperanto. Lingvo-fenomeno, kiu, cetere, fandis al si propran, apartan etnon, ĉar ĝi posedas ĉiujn bazajn konsistigajn formantojn de etno, nome: lingvon, ideologion, instituciojn. Eble oni objektos ke tiu etno ne estas space kontinua, t.e., ke ĝi ne havas propran teritorion; ke al ĝi mankas materiaj trajtoj, kiujn posedas la plimulto de etnoj; ke aparte mankas al ĝi propra antropologio, propra demografio, propra ekonomio k.s., kaj ke, sekve, en ĝi ne povas aperi patrujideo. Nu, similan fenomenon ni trovas en la juda etno, kiu dum dumil jaroj tranaĝis sian hazardoplenan, riskan ekzistadon, sen antropologia unueco, sen propra geografia teritorio, sen aparta ekonomio, eĉ sen difinita patrujideo, nur dank' al tio, ke ĝi posedis propran lingvon, proprajn tradiciojn, proprajn instituciojn. Ke Esperantujo posedas propran lingvon, proprajn tradiciojn, proprajn instituciojn, mi ne bezonas pruvi tie ĉi.

Por meti finon al nia artikolo, ni volas aludi al William Auld, kiu por multaj estas nia antonomazia originala poeto. Ni rilatis kun multaj esperantistoj. Por granda plimulto Esperanto estas io kroma, ne ĉefa, ne vitala. Por Auld, de kiam ni lin konas, Esperanto estas la esenco de lia vivo. Pri lia poeteco mi ne kapablas kompetente juĝi. Edwin de Kock, Aldo de' Giorgi, Marjorie Boulton, mem elstaraj poetoj, en siaj brilaj eseoj pri la originala poezio de Auld, aperintaj kiel enkonduko al ĉi ties plena originala poemaro, 878-paĝa volumo sub la titolo *En barko senpilota*, asertas lin unu el la ĉefaj poetoj de la Internacia Lingvo; laŭ multaj, ĝia plej granda poeto. Neniam ni renkontis en Esperantujo tiel perfektan simbiozon inter verkisto kaj lia lingvo, inter lingvo kaj poeto. Ni kuraĝas firme esprimi nian op-

inion, ke verkadi en Esperanto estas la sango de la spirito de William Auld.

Dank' al tiu perfekta simbiozo inter poeto kaj sia lingvo, Auld artisme vivantigis multajn latentajn frazeologismojn, kiaj ekz-e **ĉeuloj**, **landau/e**, **nenieso** ktp, ktp. En 1969 ni eldonis lian libron *Humoroj* kun poemoj, kiujn li verkis ĉefe en 1968, unu el kies arte pintaj pecoj estas "Sinfonieto", longa poemo konsistigita el kvar partoj. Kontraŭ la kutimo de certaj novismuloj, kiuj farĉas siajn Esperantaĵojn per tro da neologismoj, ĉiuj vortoj de tiu ĉi poemo troviĝas en *PIV*. Kaj tio ne malhelpis, ke Auld abunde metaforadu, aliteraciadu, ke per aŭdacaj vortkunmetoj kaj per la videbligo de latentaj vortoj li montru la poveblon de la lingvo por formi propran frazeologismon kaj ke tiel li riĉigu ĝin per idiomaĵoj kungeniaj, klare kaj senpene kompreneblaj, ne transplantinte alies pensokutimojn, sed forĝante propran spiriton. Neniam antaŭe ni trovis tiel elstaran ekspluatadon de la fundamentaj virtualoj de Esperanto. Plej probable neniu alia originala verkisto de Esperanto tiel flue kaj nature evoluigis sian lingvon. Ekzemple japanino Akiko Nagata pledas por formoj kiaj **aseco**, **iseco**, **oseco** k.s.;<sup>5</sup> sed jen, jam dudek jarojn antaŭe, Auld artisme uzis kaj eĉ superis tiujn frazeologismojn. Auld, ministro de la lingvo, suverenas je la eltirado, ekstraktado de tiaj diamantoj.

En la lingviĝo kaj lingvado de Esperanto, same kiel en la lingviĝo kaj lingvado de la kreolaj lingvoj, la lingvistoj havas laboratorion, kie ili povas bildigi al si kiel naskiĝis ĉiuj lingvoj kies origino datiĝas en nespureblaj pratempoj. La kreolaj lingvoj kaj Esperanto fariĝis do naturaj laborejoj kiuj spontane restituas la naskiĝokondiĉojn de la lingvoj, ilian ontogenezon kaj filogenezon. La kreolaj lingvoj kaj Esperanto prezentas jam nemalhaveblajn atingojn por la ĝenerala lingvoscienco.

Nia konvinko estas, ke la nuna

jarcenta Esperanto kaj ĉi ties literaturo, lingvofenomenoj jam elstare, rimarkinde kaj firme defilantaj per eseoj, universitataj disertacioj, doktoriĝaj tezoj k.s., post ne longe konstituos apartan, jam neignoreblan organ(ik)an studfakon de la homaj sciencoj. Tiumaniere, la homarana ekpaŝo de la ruslanda hebreo Lazaro Ludoviko Zamenhof, t.e. la Internacia Lingvo, atingos sian definitivan glorkronon.

1 Paul Ariste, Liva poezio en Esperanto, en Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo, II, Esperantismo, La Laguna, Universitato, 1987.

2 Pierre Janton, Esperanto. Lingvo, literaturo, movado, Rotterdam, UEA, 1988.

3 Vidu la fundamentan bibliografion artikolfine.

4 Juan Régulo, La frazeologisma viviĝo de Esperanto (fragmento), en Jubileo. Jarcento de Esperanto, Rotterdam, UEA, 1988.

5 Nagata Akiko, Lingvikaj vortoj de Esperanto el la vidpunkto de japanlingvano, en Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo, II, Esperantismo, La Laguna, Universitato, 1987.

#### GLOSOJ

**artefakto** (angle artefact, germane Artefakt, hispane artefacto). Faritaĵo (mehanismo, maŝino, aparato) konstruita laŭ arteleĝoj.

**fono** (france phone, germane Phon, hispane fono). Segmento de la sona kontinuaĵo, rezultinta el fonetika analizo.

**konotacio** (angle kaj france connotation, hispane connotación). Valoro sekundara, kiu ĉirkaŭumas vortosignifon aŭ lingvouzadon, ene de la valorosistemo de la lingvo.

**patenta**. Klara, perceptebla (vastiĝo de la oficiala difino).

#### FUNDAMENTA BIBLIOGRAFIO

Auld, William, La fenomeno Esperanto, Rotterdam, UEA, 1988.

Begley, Sharon, "The Fossils of Language", en Newsweek, 15 de marto, 1982. Bickerton, Derek, Roots of Language, Ann Arbor, Karoma, 1981.

Golden, Bernard, "Piĝinoj, kreolaj lingvoj kaj planlingvoj", en Hungara Vivo, num. 6, 1988.

Hagège, Claude, L'homme de paroles. Contribution linguistique aux sciences humaines, Paris, Fayard, 1985.

Janton, Pierre, Esperanto. Lingvo, literaturo, movado, Rotterdam, UEA, 1988.

Kalocsay, Kolomano, Dek prelegoj, Budapest, Hungara Esperanto-Asocio, 1985.

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto = *PIV*, Paris, SAT, 1970. Anstataŭa vortaro por ĉinaj esperantistoj: Esperanto-Ĉina Vortaro, Pekino, ĈEL, 1987.

Régulo Pérez, Juan, "Esperanto kaj Papiamento: la plej simplaj gramatikoj", en Heroldo de Esperanto, 3 kaj 4-5, 1987.

Zamenhof, Lazaro Ludoviko, Iam kompletigota plena verkaro de —, Ōsaka, Tedak. Itō Kanzi, 1979-1988, 22 volumoj.



## ESP-NOVAĴOJ

● La 3-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto okazos en Pekino en 25-30 de majo, 1990. Ĝia temo estos "Scienc-teknika Progreso kaj Internacia Ekonomia Kunlaboro". La organizantoj bonvenigas ĉinajn kaj alilandajn sciencistojn, teknikistojn kaj esperantistojn al la konferenco.

● Meze de julio finiĝis la unujara turisma kurso en la Qingdao-a Universitato. Ĝi estis funkciigita por kulturaj laborantoj por la 5-a Pacifika E-kongreso okazonta en 1992 en Qingdao. La studobjektoj estis Esperanto, turismo k.a. Esperantistoj kaj turismaj fakuloj el Pekino kaj Tianjin gvidis la kurson.

● Antaŭ nelonge, en Luoyang, fama historia urbo, la Henan-provinca E-Ligo okazigis jarkunvenon, kiun ĉeestis 50 samideanoj el 12 urboj kaj regionoj de la prov-



En la jarkunveno de Henan-provinca Esperanto-Ligo

inco. La ĉeestantoj diskutis pri Esperantaj instruado kaj propagando kaj utiligo de la lingvo en la moderniga konstruado k.a.

● Lao Rong, honora membro de la konsilantaro de la Ĉina E-Ligo, konsilanto de la Tianjin-a E-Asocio kaj membro de la Ĉina Verkista Asocio, forpasis de malsano la 29-an de aŭgusto 1989 en la aĝo de 78 jaroj.

S-ro Lao Rong memlernis Esper-

anton en 1932. Li iam organizis Nankinan E-Asocion. Poste li sin okupis pri E-movado en Tianjin. En 1951, li estis elektita kiel konsilanto de ĈEL. Li elesperantigis 10 alilandajn literaturajn verkojn.

● En la Zhejiang-a Filatela Ekspozicio okazigita de la 25-a ĝis la 29-a de junio, celebre al la 40-a datreveno de la fondiĝo de la nova Ĉinio, Shen Minglun gajnis la trian premion pro sia poŝtmark-albumo "Esperanto — internacia lingvo kreskanta". En la ekspozicio vidiĝis 57 poŝtmark-albumoj.

● "Ĉina - Esperanta Klasifika Manlibro" kompilita de Long Wen kaj Li Xia eldoniĝis antaŭ nelonge de la Henan-a Popola Eldonejo. La manlibro el 17 000 artikoloj pri familio, eduko, literaturo, arto, sporto, medicino, politiko, ekonomio, militaj aferoj, turismo, diplomatio, scienco k.a. estas klasifikitaj en 23 klasoj.


● La Tianjin-a E-Asocio organizis Esperanto-kampadon de la 11-a ĝis la 13-a de aŭgusto. 65 esperantistoj el Pekino, Qingdao, Qinhuangdao kaj aliaj 5 urboj vizitis Tanggu, naĝis en maro, faris Esperantan konversacion, okazigis sciencan diskuton, amuzan vesperon k.a. Dum la kampado junaj esperantistoj konigis E-movadon unu al alia.

● Omage al la 5-a datreveno de sia fondiĝo esperantistoj-invalidoj de ĈEA invitas vin al solena renkontiĝo okazonta de la 8-a ĝis la 11-a de junio, 1990 en Slany, Ĉeĥoslovakio. Informojn petu de Esperantistoj-invalidoj, P.K. 63, CS-274 01 Slany, ĈSSR.

● S-ino Marta S. Solis aranĝis ekspozicion sub la titolo "Ĉinio kaj Esperanto" en la urbo Venado Tuerto, Argentino, kiu daŭris 10 tagojn. Inter la ekspoziciaĵoj trovi-



Fraŭlino Milda Kohei en la ekspozicio



Esperanto-kampado

ĝis multaj EPĈ-ekzempleroj. La foto montras fraŭlinon Milda Kohei, kiu estas nepino de ĉino kaj unu el la organizantoj de la ekspozicio.

● Kooperativa Esperanta Sekcio ĉe Bulgara Esperanto-Asocio eldonis la broŝuron "Kontribuo de bulgara kooperativo al la monda kooperativa movado" de licenciulo Julia Delĉeva-Pejkova, kaj senpage sendos ĝin al la interesitoj, kiuj skribis al la sekcio kaj petas ĝin. Tio konstatas, ke la Centra Kooperativa Unuiĝo en Bulgario daŭrigas la malnovan tradicion por eldonaĵoj en Esperanto.

● Granda kaj subita intereso pri la interlingvistikaj temoj ekestis en Kolombio. Konataj lingvistoj deziras profunde informiĝi pri tiuj temoj. Tamen al LAPEK (Latinamerika Peresperanta Kulturcentro) mankas koncernaj materialoj. Tial LAPEK petas vian helpon: Sendu donace aŭ interŝanĝe verkojn pri la temo de interlingvistiko (originalaĵojn, fotokopiaĵojn, librojn, revuojn k.a.) al: LAPEK, Apartado Aéreo 528, Armenia (Q), Kolombio.

# Korposanigaj Metodoj (X)

## KOLAJ KAJ DORSAJ MALSANOJ

3. Kuŝu surventre, etendu la maldekstran gambon kun forte rektigitaj piedfingroj posten kaj etendu la dekstran manon antaŭen laŭeble (Bildo 1). Etendu la dekstran manon trans la dorson kaj tiru la maldekstran piedon per la mano. Levu la piedon supren laŭeble kaj samtempe levu la kapon posten (Bildo 2) por streĉi la dorson. Forte streĉu la piedon kaj manon, iom malstreĉu kaj denove streĉu. Dum la ekzercado nepre memoru la ordon de la movoj de la manoj kaj piedoj. Faru la movojn 14 fojojn alterne laŭ la vicoj de manaj kaj piedaj movoj. Tiuj movoj estas utilaj por forigi doloron de malvarma vento kaj sufokiĝon ĉe la dorso, nuko, lumbo, genuoj kaj ŝultroj kaj la dorsan rigidiĝon.

4. Staru sur unu piedo, etendu la alian antaŭen laŭeble, la brakojn ambaŭflanken kaj turnu la supran korpon dekstren kaj maldekstren. Faru tion 28 fojojn. Tio estas utila por forigi intestan malvarmon, lumban kaj dorsan rigidiĝon kaj ostalgion kaj stimuli la cirkuladon de *ĉi* (vitala energio) kaj sango por nutri la tutan korpon.

## LUMBAJ, DORSAJ KAJ KOKSAJ MALSANOJ

1. Kuŝu surventre, etendu la

manojn posten kaj per ili tiru la piedojn forte (Bildo 3). Levu la kapon posten, forte etendu la piedfingrojn eksteren. (Elstarigu la bruston, levu la kapon kaj enspiru dum la forta tirado de la piedoj kaj elspiru dum malstreĉado de la manoj.) Streĉu kaj malstreĉu la kapon kaj piedojn. Faru tion 7 fojojn. Fine malstreĉu la manojn kaj etendu ilin antaŭen. Libere svingu la piedojn, dume ne movu la genuojn. Faru tion 14 fojojn. (Ĉiu fojo konsistas el etendo de la manoj kaj ŝancelo de la piedoj sen movado de la genuoj.) Tiuj ekzercoj estas utilaj por forigi rigidiĝon de la lumbo kaj spino kaj ilian doloron pro vento kaj malvarmo en la kombino.

2. Etendu la gambojn rekte (starante aŭ sidante). klinu la kapon antaŭen, ambaŭmane kaptu la piedfingrojn 7 fojojn. Tiuj movoj estas utilaj por forigi la doloron de lumbo kaj malfacilon en kliniĝo antaŭen kaj posten.

3. Alterne svingu la gluteojn forte (t.e. alterne svingu la krurojn posten plurfoje). Retenu la spiron post enspiro. Faru tion 9 fojojn. Tio estas utila por forigi koksan doloron kaj lacon.


4. Kuŝu surventre sen kapkuseno kaj starigu la piedojn. Enspiru kaj elspiru per nazo 40 fojojn. La enspirado devas esti malrapida por ke la aero eniru en la nazon sensente. Tiuj movoj povas forigi febron kaj dorsan doloron.



1



2



3



4

## MEMBRAJ MALSANOJ

1. Staru kaj kiel eble plej forte etendu la manojn posten. Fleksu la kubutojn posten kun la manplatoj malsupren. Levu kaj mallevu la ŝultrojn 28 fojojn (Bildo 4). Turnu la talion sen movo de la piedoj. Mallevu la manojn kaj turnu la manplatojn ĉiudirekte. Tiuj movoj estas utilaj por forigi brakan konvulsion.

2. Etendu la manojn supren kun la fingroj supren. Turnu la talion kun la levitaj manplatoj maldekstren kaj dekstren. Fleksu la kubutojn kaj levu ilin supren laŭeble 28 fojojn. Mallevu la manojn, nature svingu la manojn posten kaj malforte elspiru. Faru tion 14 fojojn. Fine levu kaj mallevu la ŝultrojn 14 fojojn. Tiuj movoj estas utilaj por forigi doloron de la brakoj kaj ripoj. ■

(Daŭrigota)

# Branda Kulturo de Guizhou

de WEI RAN

**J**E mencio de brando de Guizhou-provinco, oni nature ekpensas pri la brando Maotai kun delikata aromo. Ĝi estis juĝita kiel fama brando kaj gajnis ŝtatan oran medalon en la pasintaj tutlandaj alkoholaĵ-juĝaj kunvenoj. Ĝi estas fame konata kaj portis altan merkatan prestiĝon al aliaj mezklasaj brandoj de Guizhou. Diversaj lokoj de Guizhou-provinco produktas brandon, interalie brando de pli ol mil markoj ricevis rekonon de la ŝtato, dekoj da markoj akiris la titolon "bonkvalita brando" de la ŝtato, la Ĉina Malpezindustria Ministerio kaj Guizhou-provinco, aŭ internacian oran medalon.

Guizhou havas longan historion en brando-farado. Arkeologoj montris, ke jam en pratempo oni komencis fari vinon en Guizhou, t.e. prahoman vinon menciitan en antikva libro. En neolitiko, kun disvolviĝo de primitiva agrikulturo oni faris vinon el sovaĝaj floroj, fruktoj kaj mielo kaj laktan vinon el lakto de brutoj. Antaŭ pli ol 1 000 jaroj a.K. loĝantoj de Guizhou jam posedis teknikon por fari giston.

La 13 nacimalplimultoj mjaŭ-oj, buji-oj, dung-oj, ji-oj, ŝuj-oj, huj-oj, gelaŭ-oj, ĝŭang-oj, jaŭ-oj, tuĝja-oj k.a. de Guizhou ĉiu havas siajn vinfaran tradicion kaj drinkan moron. Vino akompanas ilin en ĝojo kaj malĝojo en longa historio kaj formis originalan drinkan moron.

Vino estas uzata en gastobonvenigo, celebros, kulto, nasko, funebro, edziniĝo, edziĝo kaj precipe en festaj tagoj. Malsamaj nacimalplimultoj havas malsamajn drinkajn morojn. La antikvaj drinkaj kantoj montras la modestan senton de tiuj nacimalplimultoj.

La vojbara drinko estas moro de mjaŭ-oj, buji-oj, dung-oj kaj ŝuj-oj. Ili faras barajon antaŭ sia loĝejo aŭ antaŭ la vilaĝo por bari gaston venintan el malproksima loko. Kiam venas la gasto, junulinoj kantas por inviti lin al drinko. Post kantado oni prezentas bovlon da vino al la gasto. Nur post eltrinko la gasto povas eniri. La vojbara drinko estas ankaŭ por adiaŭi gaston. Nur kiam la gasto eltrinkas la vojbaran vinon, la

gastigantoj adiaŭas lin.

Reciproki bovlojn kun vino montras profundan amikecon inter amikoj. Dum la drinkado, du personoj tenas po unu bovlon da vino, donas la vinon unu al la alia por drinki samtempe. Aŭ multaj personoj cirkle sidas ĉiu kun bovlo da vino en la mano, samtempe laŭ sama direkto prezentas ĝin al apudsidanto por samtempe drinki.

Estas pli interesa la moro pri drinka sigelado furoranta en la regiono de mjaŭ-oj. Post kiam ĉiu el la gastoj eltrinkas bovlon da vino, oni faras unu sigelon sur lia vizaĝo. Kiam la gastoj havas pli multajn sigelojn survizaĝe, tio montras gastamon de la gastigantoj kaj funelan drinkadon de gastoj. En la lokoj de mjaŭ-oj, ji-oj, gelaŭ-oj

Alkoholaĵ-juĝistoj en la Fabriko de Dong-brando







Mjaŭ-aj knabinoj baras vojon, kun glaso plena de vino.  
Foto de **WANG XINMIN**



Invito al drinko

Foto de **WANG XINMIN**

kaj tuĝja-oj furoras tuba drinkado kun longa historio. Dum drinkado ĉiuj personoj metas speciale faritan bambuan tubon en vinvazon kaj kune suĉas la vinon, en akompano de kantado kaj dancado. Tia moro ofte videblas en festaj kaj celebraj tagoj.

lan moron kaj socian fizionomion. Ili havas ne nur valoron de uzado, sed ankaŭ gravan valoron en historia studo kaj altan valoron por arta prezado.

ĵo troviĝas en Kantono kaj bona drinkaĵo en Guizhou". En Guizhou oni povas ne nur ĝui bonkvalitan brandon, sed ankaŭ aprezi la originalan brandan kulturon de Guizhou. ■

Popoldiro rakontas, ke "franda-

Antikva arĝenta vinkruĉo de Ĉinio

Lastatempe, kiam mi vizitis la Dong-brandan Fabrikon de Zunyi, Guizhou, mi aŭdis tian rakonton: Dong-brando estas farita de maljunulo Cheng Mingkun. Dum la branda farado, li enmetis valorajn drogojn de pli ol 100 specoj. Por forigi la tro fortan drogan guston en la brando, li faris multan eksperimenton, sed malsukcesis. Iun tagon, la maljunulo kultis la antikvan faman drogan fakulon Li Shizhen por peti lian helpon. Poste, li vere ricevis konsilon de la majstro en sonĝo, ke li enmetu iometon da sekigitaj skolopendroj en la brandon por forigi la malagrablan guston. Ŝanĝinte sian recepton laŭ la konsilo, fine la maljunulo sukcese faris la klaran kaj bongustan Dong-brandon, kies prepara recepto fariĝis sekreta "skolopendra recepto".

En Guizhou troviĝas diversaj delikate gravuritaj vinuoj de nacialplimultoj el pasintaj dinastioj, kiuj spegulas tiamajn popo-



### Lisu-oj

Pentraĵo de AN JIA

Lisu-oj, kiel nacimalplimulto de Ĉinio, vivas ĉefe en la Nuĵiang-a Lisu-nacieca Subprovinco de Yunnan kaj iuj en Liangshan, Sichuan-provinco.

Plejparto de la lisu-oj portas mem teksitajn tolajn vestojn. La virinoj portas ĵaketon dekstre butonumitan kaj longan jupon, kun ruĝaj kaj blankaj bidoj sur la kapo kaj ringo el koloraj bidoj ĉe la brusto. Kaj la viroj havas sur si jaketon kaj pantalonon etenditan ĝis la genuoj. Iuj el ili volvas la kapon per blua tuko, kun glavo ĉe la maldekstra flanko de la talio kaj sagujo ĉe la dekstra.

Lisu-oj estas politeistoj kaj adoras la naturon. Iliaj lignaj kaj bambuaj domoj alkroĉiĝas al montoj, iuj kun granda fajrujo en sia mezo. Lisu-oj kantas kaj dancas en geedziĝa ceremonio, domkonstruado, ĉasado aŭ rikoltado. En tradiciaj festotagoj vilaĝanoj preparas vinon, buĉas porkojn kaj reciprokas donacojn. Kiam noktiĝas, ili bruligas kampfajron, kiu daŭras ĝis tagiĝo. Ili kantas kaj trinkante dancas tra la nokto.



## ABONTARIFO DE EPC POR 1990

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	15.50	25.5	35.5
Aŭstrio	ATS	210	350	490
Belgio	BEF	600	980	1350
FR Germanio	DEM	32	52	72
Britio	GBP	9	14.5	20
Finnlando	FIM	70	115	160
Francio	FRF	100	160	220
Hispanio	ESP	1500	2400	3400
Italio	ITL	20000	32500	45000
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	35	59	83
Nov-Zelando	NZD	21	35	49
Portugaliao	PTE	1500	2400	3400
Svisio	CHF	26	43	62
Usono	USD	15	25	35
Kanado	CAD	15	24	34

### Por aliaj landoj en Eŭropo:

USD 11 18 25

### Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

USD 7.5 12 17

Generala distribuanto: Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

La peranto de "EL POPOLA ĈINIO"  
en Venezuelo

Samideano

DAVID G. VALECILLOS V.

Calle 79 No. 3C-72

MARACAIBO-4002. VENEZUELO

bonvenigas ankaŭ abonkotizojn en ĉiuj latinamerikaj landoj, en kiuj ne estas perantoj de ĉi tiu revuo.

BONVENON AL ABONANTOJ DE  
"EL POPOLA ĈINIO" EN LATINAMERIKO!

# Ĉinaj Piramidoj

de LI QIANG

**K**IAM oni mencias piramidon, oni ĉiam rememoras maŭzoleon de Faraono de la antikva Egiptio. Sed fakte, ankaŭ Ĉinio havas piramidojn. Mi iam vizitis tri antikvajn maŭzoleojn nomatajn "ĉinaj piramidoj". Ili estas la maŭzoleo de Shaohao en Qufu de Shandong, la maŭzoleoj de la reĝoj de la antikva Okcidenta Xia-regno en Yinchuan de Ningxia kaj la Maŭzoleo de Generalo en Ji'an de Jiling.

En 1984 mi faris oficovojaĝon en Shandong-provinco kaj interalie vizitis la maŭzoleon de Shaohao. Laŭ legendo, Shaohao estis unu el la kvin ĉinaj antikvaj reĝoj, dio veninta de la ĉielo. Li estis sur la trono 84 jarojn kaj vivis cent jarojn. Kiam li regis Ĉinion, la popolanoj estis virtaj, regis paco kaj la ĉielo benis ilin. Por memori la prapatron de la ĉinoj, liaj posteuloj konstruis por li maŭzoleon kvar km. oriente de la gubernia urbo Qufu.

Oni ne scias, kiam ĝi estis ekkonstruita. Historia noto montras, ke en Song-dinastio (960-1279 p.K.) oni konstruis la tombon el ŝtonoj kaj en Ming- kaj Qing-dinastioj (1368-1911) oni plurfoje ĝin rekonstruis. Ĝi estas konstruaĵo en formo de piramida trunko malofte videbla en Ĉinio. La malsupra eĝo de la konstruaĵo longas 28 m., la supra 9.4 m. kaj la flanko 15.2 m. Sur la trunko staras Shaohao-templo. La supraĵo de la trunko estas farita el glataj ŝtonplatoj. Tial la tieaj popolanoj nomas ĝin Dekmilŝtona Monto.

La konstruaĵo aspektas bele, kun harmonia strukturo. La proporcio de la supra kaj flanko eĝoj konformas al la ora sekco kaj impresas majeste kaj impone.



En 1988, mi rigardis en Ningxia “orientajn piramidojn” — la maŭzoleojn de la reĝoj de la Okcidenta Xia-regno. Mi aŭte veturis al Helan-montaro. De malproksime mi vidis la piramidajn konstruaĵojn alte starantajn ĉe la mont-piedo. La flava konstruaĵo kun verda monto kiel sia fono aspektas impone kaj grandioze.

La gigantaj konusaj maŭzoleoj estas teraj. Ĉiu estas dekojn da metroj alta kaj ĉirkaŭita de rompita muro. Tio rememorigas la imponan kaj luksan kastelon de reĝo.

La Okcidenta Xia-regno (1032-1227 p.K.) estis malgranda regno en nordokcidenta Ĉinio. En la regiono de la maŭzoleoj de la reĝoj de la Okcidenta Xia-regno en la orienta parto de Helan-montaro estas entombigitaj naŭ reĝoj kaj pli ol 140 aristokratoj. La maŭzoleoj de la reĝoj frontas al sudo, kun totala areo de pli ol 100 000 kvadrataj metroj, kaj la surteraj konstruaĵoj, ĉiu el dia muro, angulaj turoj, gardturoj, steleo, ekstera muro, interna muro, oferhalo kaj pagodforma oferteraso, estas simetrie aranĝitaj laŭ la nord-suda akso.

La maŭzoleo Tailing de Li Yuanhao, la unua reĝo de la Okcidenta Xia-regno, estas la plej granda en la regiono. Li surtroniĝis en la aĝo de 34 jaroj. Li estis prudenta, erudicia kaj kuraĝa. Li lanĉis militon kontraŭ siaj najbaraj landoj, ekspansiigis la teritorion kaj fine faris la regnon la plej potenca nordokcidente de Ĉinio. Li vivis diboĉan vivon kaj konstruigis por si gigantan maŭzoleon. Nun krom la alta oferteraso, restas neniu alia konstruaĵo de la maŭzoleo surtere. Feliĉe, tie estas tri ŝtonskulptitaj steleobazoj antaŭ nelonge elterigitaj sur la ruino de la oferteraso. Tio estas tri homfiguraj monstroj kun granda ventro, elstaraj mamoj kaj larĝe malfermitaj okuloj. Ili staras surgenu, tenas super la kapo aŭ portas surdorse pezajn ŝtonsteleojn, montrante neelĉerpeblan forton. La tri skulptaĵoj donas al la maŭzoleo ian vivecon. Oni povas vidi karakterizaĵojn de la arto kaj liberalan spiriton de la nacio de la Okcidenta Xia-regno.

La Maŭzoleo de Generalo estas pli simila al piramido de Egiptio. Ĝi estas maŭzoleo de reĝo de la antikva korea nacio de Ĉinio. Gaogouli-regno translokis sian ĉefurbon de Liaoning al Ji'an en 3 p.K. kaj retranslokis ĝin al Pjongjang en 427 p.K. Dum la periodo de 3 ĝis 427 Ji'an estis la politika, ekonomia, kultura kaj milita centro de Gaogouli-regno. Nun en ĝi konserviĝas granda nombro da kulturaj historiaj restaĵoj. Precipe ekster la urbo dislokiĝas dekmiloj da antikvaj tomboj.

Ei la sennombraj maŭzoleoj la plej okulfrapaj estas la Maŭzoleo de Reĝo Haotai kaj la Maŭzoleo de Generalo. Ili, faritaj el ŝtupare masonitaj ŝtonoj,



La maŭzoleo de Shaohao

aspektas kiel piramidoj de Egiptio. La Maŭzoleo de Generalo estas pli bone konservita.

La Maŭzoleo de Generalo situas 4.5 km. nordoriente de Ji'an, sur vasta ebena sundeklivo, kie kuŝas multe da tomboj. Ĝi havas formon de piramida trunko, altas 12.4 m., kun baza eĝo longa 31.5 m. La baza areo estas 960 kvadrataj metroj kaj la supra 270 kvadrataj metroj. La maŭzoleo estas masonita el prilaboritaj longaj granit-pecoj kaj ene plenigita per rul-ŝtonoj. Por konstrui ĝin oni uzis 6 000 kubmetrojn da ŝtonoj. La maŭzoleo havas sep ŝtupojn. La unua ŝtupo estas la plej alta, masonita el kvar tavoloj da longaj ŝton-pecoj kaj la aliaj ses el po tri tavoloj da tiaj ŝton-pecoj. Ĉiuj tavoloj metiĝas unu sur alian kaj kuntiriĝas internen por malebligi eksterenmoviĝon de masonitaj ŝton-pecoj sub la pezo de rul-ŝtonoj. Krome, ĉe kvar flankoj de la maŭzoleo vidiĝis po tri ŝtonegoj (nun restas nur du). Ĉiu ŝtonego pezas pli ol 15 tunojn. La entomba ĉambro staras sur la tria ŝtupo kaj la tomba enirejo meze de la kvina ŝtupo. La ĉambro 5.5 m. alta estas kvadrata, kun eĝo 5 m. longa. La maŭzoleo estis priŝtelita. La nun vidataj du ĉerkoj estas riparitaj. Estas mirinde, ke pli-ol-50-tuna ŝtonplato kun areo de 60 kvadrataj metroj servas kiel la kovrilo de la ĉambro. Neniu scias, kiel oni metis ĝin siatempe sur la supron de la tombo?


En la tombejo ekzistis ankoraŭ kvin malgrandaj tomboj, nun restas nur unu el ili.

La Maŭzoleo de Generalo montras sian imponecon kaj grandiozecon. Ĝi estas unu el la ŝtonaj maŭzoleoj konstruitaj en la lasta periodo de Gaogouli-regno. La formo de maŭzoleo furoris de la fino de la 4-a ĝis la komenco de la 5-a jc. ■



La maüzoleo de Generalo

La maüzoleo de reĝo de la Okcidenta Xia-regno






# Qianqing- pordo kaj kortega kunveno

Teksto de MU YI

Fotoj de YAN JIN

Longzong-pordo



**P**OST Baohe-halo estas ortangula placo 200 m. × 50 m. Ĝi estas la limo inter la antaŭaj haloj

kaj postaj kortoj. Norde de la placo estas pordo domforma. Ĝi estas la fronta pordo Qianqing de la postaj

domaroj, la loĝejo de la imperiestra familio.


Orumitaj bronzaĵoj



La pordo Qianqing tegmentita per flavaj glazuritaj tegoloj sidas sur bazamento ĉirkaŭita per balustrado el blanka marmoro. Sub la perono antaŭ la pordo estas tri ŝtonaj ŝtuparoj kaj la meza estis gravurita je drakoj kaj nubflokaj. Ambaŭflanke de la pordo staras v-forma ekrana muro el reliefaj kaheloj. Antaŭ la pordo kaŭras paro da oritaj bronzaĵoj kaj iom pli fore staras 8 oritaj gigantaj bronzaĵoj, en kiuj oni rezervis akvon por estingi fajron. Interne de la pordo estas pluraj kortoj kun luksaj domoj por la imperiestra familio.



## PLANO DE LA MALPERMESITA URBO



N-ro 7 en la plano signas Qianqing-pordon.

En la dinastioj Ming (1368-1644) kaj Qing (1644-1911) la pordo Qianqing ludis malsamajn rolojn. En Ming-dinastio la pordo estis fronta pordo de la postaj kortoj destinita por traŭro de imperiestro. En Qing-dinastio Qianqing-pordo fariĝis multe pli grava loko kaj servis, anstataŭ Taihe-pordego, kiel kunvenejo, ĉar Qianqing-pordo situas plej proksime al la imperiestraj loĝejoj Qianqing-palaco kaj Yangxin-palaco, kio estis tre oportuna al la imperiestroj por kunvoki la korteganojn. Tie la imperiestroj ĉiutage okazigis matenan kunvenon, akceptis princojn, korteganojn kaj fremdlandajn delegitojn kaj sankciis nomumon de *ĝinŝi*. Krome tie okazis ankaŭ edziĝa ceremonio de kronprincoj aŭ princinoj.

En Qing-dinastio la kortega matena kunveno okazis de la 7-a ĝis la 9-a horo. Antaŭ la kunveno oni instalas meze en la pordo tronon, tablon tegitan per flava silko antaŭ

staris ambaŭflanke de la trono sin direktante al la oriento. *Hanlin* (oficisto de imperia akademio) kaj ŝtataj prokuroroj staris malsupre de la perono. La raportantaj oficistoj asignitaj de la kabineto genuis oriente de la placo kun la vizaĝo al la okcidento. Laŭvice raportis la oficistoj de la ministerioj pri imposto, ceremonio, militafero, laboro kaj oficistaro. Shangshu (ministro) surgenuis iris antaŭ la tablon, metis la raportan skribaĵon sur la tablon kaj retiriĝis al sia loko. Li faris raporton surgenuis. Post la raporto li foriris de la orienta ŝtuparo. Tion ripetis la sekvantaj laŭvice. La imperiestro faris decidon por ĉiu raportaĵo kaj sciigis al la raportanto. Ĉe la raportado de sekretaj aferoj *hanlin*, prokuroroj kaj gardistoj devis foresti. Oficistoj *daŝjueŝi* kaj *ŝjueŝi* eniris kaj genuiĝis, dum *ŝjueŝi* el manĉura deveno raportis surgenuis tenante la raportan skribaĵon en la mano. La imperiestro faris dekreton post ĉiu raporto. Kiam finiĝis la lasta

la trono kaj ekranon post la trono. Maldokstre antaŭ la trono oni metis tapiŝeton por genuiĝo de la raportantoj. Ambaŭflanke de la trono staris gvardianoj. Ambaŭflanke de la pordo sub la ŝtuparo staris palacaj oficistoj kaj armitaj gvardianoj. Sur la placo antaŭ la pordo atendis la korteganoj de diversaj ministerioj.

Dum la kunveno la imperiestro sidis sur la trono. Nobelo-

raporto, la imperiestro reiris en sian loĝejon, la nobelo-ĉambrieroj descendis la peronon de la okcidenta ŝtuparo, kaj la kunvenantoj disigiĝis.

Kangxi (1662-1723 sur la trono) estis relative kompetenta imperiestro de Qing-dinastio. Li regis 60 jarojn kaj reguligis la matenan kunvenon. Li diris, ke li maltrankviligis, se la matena kunveno ĉesis je unu tago. Multajn gravajn decidojn li faris en la matena kunveno, ekzemple ekspedicio al la sudaj separatismaj reĝimoj kaj repreno de Taiwan-insulo. Tiuj faroj fundamentis la unuiĝon de la multnacia Ĉinio, la integrecon de la teritorio kaj la centjaran prosperon de Qing-dinastio.


Pro sia grava rolo, Qianqing-pordo estis zorge gardata sub la gvido de du oka-klasaj oficistoj. 12 eŭnukoj prizorgis la instaladon de la trono kaj ekranon kaj registris la nomojn de traŭrotoj. Dum la kunveno multe da gvardianoj gardis la lokon. Sur la muroj ambaŭflanke de la pordo siatempe estis fostoj kun najloj en regula distanco, sur kiuj la gardistoj povis pendigi sabrojn. Multaj el la gardistoj ĉe Qianqing-pordo poste estis promociitaj al grava posteno. Se oficistoj ricevis permeson iri en la internajn kortojn, ili devis iri tra la dekstra enirejo okcidente de Qianqing-pordo.

Malgraŭ la rigora gardado okazis ĉe Qianqing-pordo grava landskua afero.

Longzong-pordo okcidente de la placo antaŭ Qianqing-pordo kaj Jingyun-pordo oriente de la placo estis destinitaj por traŭro de korteganoj. Laŭ regulo de Qing-registaro traŭro de tiuj du pordoj estis malpermesita al oficistoj civilaj super la tria klaso sed malpli altaj ol princo, kaj militaj oficistoj super la dua klaso, se ili ne estis alvokitaj de la imperiestro. La sekvantoj de princoj devis atendi 20 metrojn for de la pordoj. Sed malgraŭ la rigora gardado, ribelantaj kamparanoj sukcesis eniri en la pa-

lacon kaj faris atakon ekster Longzong-pordo. Nun super la pordo Longzong ankoraŭ vidiĝas postsigno de difekto de sago.

Analoj notis, ke en la 15-a de la naŭa monato de 1813 estis serena tago kaj en Pekino regis paco kaj vigleco. Neniu rimarkis, ke sur la stratoj proksime de la imperiestra palaco multiĝis kampuloj en ĉifona vesto. Efektive ili estis ribelantoj senditaj de Lin Qing, la ĉefo de la socio Tianlijiao en la antaŭurbo de Pekino, por ataki la palacon. Antaŭvespere ili enŝteliĝis en la urbon en du grupoj kaj kuniĝis en la antaŭkonsentita loko. Lin Qing sekrete interkonsentis kun eŭnuko Liu Quan kaj aliaj kvin personoj en la palaco, ke ili levu atakon tagmeze de la 15-a tago de la naŭa monato de la jaro. Liu Quan kaj liaj kamaradoj kunportis blankan rubandon por doni signalon. Ili gardis ĉe la pordoj Donghua, Xihua, Longzong kaj Jingyun por enlasi la ribelantojn. En la tagmezo la ribelantoj atingis la pordon Donghua kaj Xihua. Vidinte ilin, la eŭnuko atendanta ĉe la pordo Xihua ĵetis supren la blankan rubandon. Ĉe tio la ribelantoj tuj mortigis la gardistojn, trairis la pordon Xihua kaj sturmis la pordon Longzong. La alia grupo de la



Ekрана muro el reliefaj kaheloj


ribelantoj devis halti ekster Donghua-pordo, ĉar la vojo estis okupita de portistoj portantaj karbon en la palacon. En ilia kverelo gardistoj rimarkis, ke tiuj ĉifonuloj havas sabron ĉe la talio, kaj tuj alarmis: "Fermu la pordon!" Tial nur pli ol 30 ribelantoj sukcesis enkuri, dum la ceteraj restis ekster la pordo.

Tiutage la imperiestro Jiaqing estis ekster la urbo kaj en la palaco Qianqing estis nur liaj filoj legan-


taj. Kiam la ribelantoj sturmis de Xihua-pordo, iu oficisto informis Minning, la duan filon de la imperiestro, pri la danĝero. Minning tuj ordonis fermi la pordojn Longzong kaj Jingyun. Tiam la ribelantoj jam atingis Longzong-pordon. Antaŭ la alta muro kaj fortika pordo, la ribelantoj havis malfacilon por ataki. Ilia ĉefo ordonis al kelke da sagacaj junuloj transgrimpi la muron. Sed tion rimarkis Minning kaj mortigis du el ili. Tuj poste venis pli ol mil soldatoj. Ekster Longzong-pordo okazis arda batalo, kiu daŭris ĝis la noktomezo. La ribelantoj fine estis venkitaj de la fortaj malamikoj.

La 19-an de la monato la imperiestro Jiaqing malĝoje revenis en Pekinon kaj publikigis "Sinkulpigan Dekreton". La placo antaŭ Qianqing-pordo estis plena de genuantaj princoj, korteganoj kaj altrangaj oficistoj. Ĉiuj klinis la kapon kaj atendis la venon de la imperiestro. Sur la placo regis sufoka etoso. La imperiestro lante iris el la pordo, kaj oficisto voĉlegis anstataŭ li la "Sinkulpigan Dekreton". Post la lego li anoncis serion da dekretoj pri premio kaj puno. Lia dua filo Minning mortigis du ribelantojn kaj estis titolita princo Zhi (saĝo). Post 7 jaroj Minning surtroniĝis. ■


Ekster Qianqing-pordo













FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

815

La Sala Urso-Lago de Rumanio  
de ANNAMARIA KALLOS (Rumanio)

Glacirivero de Argentino  
de MARIANO DOMINGO IBANEZ  
(Argentino)

